

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 576 (11) NOVEMBRO 1953



Anguleto en Haarlem

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JAKOB
Palais Wilson, Genève, Svislando

Helpredaktoro : MASON STUTTARD

Traduko kaj represo de artikoloj estas
permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton.
Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

Jara abono (1954) : 15 ŝil. anglaj (kun
membrecio kaj jarlibro 20 ŝil.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £6 ½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil. ⅛ paĝo 15 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duo da vortoj

Legantoj en 80 landoj

Eldonnumero 6000



Enhavo

Specialaj Artikoloj :	paĝo
Esperanto kaj Eminentuloj : <i>Hans Jakob</i>	313
Esperantismaj Problemoj—La Eldono : <i>Hans Jakob</i>	314
Spegulo de Nuntempo	317
Sonimitaj Vortoj : <i>A. Sauvageot (trad. P. Kempeneers)</i>	327
La Poezio de la Eskimoj : <i>Poul Thorsen</i>	331
Rakonto :	
La Dazipo de Brazilo : <i>Erika Linz</i>	341
38a Universala Kongreso :	
Fina Statistiko	323
Eĥoj de la 38a Kongreso	342
I.L.E.I. Kunvenis en Zagreb	324
39a Universala Kongreso :	
Oficiala Komuniko N-ro 1	323
Belartaj Konkursoj de U.E.A., 1953 :	
Raporto pri la branĉo Originala Prozo	339
Raporto pri la Drama Branĉo	340
Konstantaj Rubrikoj :	
Centro de Esploro kaj Dokumentado	325
Enigma Konkurso	343
Esperantista Vivo	337
Internacia Konkurso	340
Oficiala Informilo	344
Radio kaj Esperanto	338
Tra la Libraro	329
Tra la Mondo Esperantista	318

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 576

Novembro 1953



Esperanto kaj Eminentuloj

LA socia strukturo de la Esperanto-Movado estas mezklasa-laborista, du sociaj tavoloj ne plu klare disigeblaj. Proporcie malgranda estas la nombro de intelektuloj, aliĝintaj al Esperanto kaj kiuj ne hontas konfesi, ke ili okupiĝas pri ĝi. La mondo scienca suverene rigardas nian klopodadon. Nur iuj kuraĝuloj, penintaj lerni la lingvon kaj konstatintaj propravide la funkciadon, estas veraj blankaj korvoj (blankaj merloj) inter siaj kolegoj. La supera burĝa klaso (tiom kiom ĝi ankoraŭ ekzistas), la potencaj industrikapitanoj, la direktoroj kaj gvidantoj de gravaj entreprenoj ĉiaspecaj, ja eĉ la estroj de sindikatoj laboristaj, ili ĉiuj de supre rigardas nian aferon kaj ne volas sciigi pri la avantaĝoj kiujn prezentas la uzado de la internacia lingvo jam nun.

Jam multaj inter ni sin demandis, kio estas la veraj kaŭzoj de tiu ĉi sinteno, flanke de tre kleraj kaj spertaj homoj. Analizante tiun ĉi fenomenon, oni alvenas je sekvantaj konstatoj:

Unue: Certe estas ĝenante al grava persono, okupanta socian pozicion superan, esti rigardata kiel speco de "originalulo" eble eĉ de "strangulo", ĉar nur tia povas sin okupi pri tia utopia afero kia ŝajne estas internacia

lingvo. "Certe li estas tre forta en sia profesio kaj li estus konsiderita ankoraŭ pli multe, se li ne havus tiun ĉi kapricon sin okupi pri Esperanto", jen diraĵo kiun la verkinto jam aŭdis pri elstara samideano.

Due: Rezultas el tia konsidero certa risko por la koncerna persono perdi ion, ĉu morale ĉu materie. La anoj de la intelekta klaso ja devas tre atenti ne deflankiĝi de la propra branĉo, la specialistiĝo de nuna epoko tion naturdevige postulas. Aliflanke nur malgranda nombro da intelektuloj estas sufiĉe finance sendependaj por riski materian perdon. Ekzistas ja tiaj inter ni, kiuj pro intensa sinokupo pri Esperanto malutilis al si mem en la kariero.

Trie: La plej stranga kaŭzo de malintereso por Esperanto estas la pretendita kono de pluraj lingvoj; sekve "mi ne bezonas internacian lingvon". Tian sintenon oni renkontas ekzemple ĉe sekretarioj de sindikatoj laboristaj, homoj ofte per meminstruo lernintaj du aŭ tri aliajn lingvojn, ja eĉ atingintaj certan gradon de perfekteco. Pri aliaj individuoj finance interesitaj je la diverseco lingva, tradukistoj ekzemple, ni ne parolu.

Ekzistas nun kategorio de kleruloj, de eminentuloj ĉiaspecaj, kiuj okaze

de intervjuo tute aprobas la ideon, eventuale laŭdas ĝin, esprimas sin favorejaentuziasme, sed nelernas la lingvon ! Se tiaj ne subtenus nian klopodadon, ja nenion oni dirus. Kiom da favoraj deklaroj dum daŭro de kvindek jaroj ni registris ! Estas centoj, ja eĉ miloj. Tiaj deklaroj en certa grado eĉ malutilas nian aferon; plej ofte ili estis donitaj por ke nomo aperu, por ke la homa ambicio ricevu kontentigon.

El la supra konstato kaj el ĝisnuna

sperto ni lernu, ke movado batalanta por rekono publika ne altiras eminentulojn kaj intelektulojn. Ili venos en la momento kiam la oferemaj kaj sindonaj homaranoj sukcesis. Tiel okazis en aliaj tut-homaraj penadoj kaj la nia ne povas fari escepton, la homa naturo restas la sama.

Respekton senliman al ili, la modestuloj kiuj per ago kaj mono kunhelpas por sukcesigi noblan ideon.

Hans Jakob.

Esperantismaj Problemoj

LA ELDONO

EN la Marta eldono de *Esperanto*, Doktoro Lapenna prilumas problemon tre gravan: "Krizo de nia literaturo". Ne estas la loko tie ĉi por akcenti, ke efektive ekzistas krizo. Ĝi estas ne nur tia de la enhavo de publikiĝaĵoj, sed ankaŭ tia de eldono kaj vendo. Tiun ĉi flankon ni intencas prilumi en tiu ĉi artikolo.

1. Eldono

La eldono de verko en Esperanto dependas de pluraj faktoroj, kiuj cetere ankaŭ ekzistas por tia en kia ajn nacia lingvo. Verkisto sin turnas al eldonisto, proponas verkaĵon, petas kondiĉojn. Plej ofte, kaj same ankaŭ por nacilingva verko, la eldonisto klopodas meti la riskon tute aŭ parte sur la verkiston. Nur tre malofte kaj nur ĉe konata verkisto kies nomo estas kvazaŭ garantio por vendi la eldonaĵon, eldonisto emas preni la tutan riskon sur sin. Necesas koni tiun ĉi fundamentan kondiĉon por kompreni pli bone la tute specialan situacion de la eldono de verkoj en Esperanto.

2. Pur-esperantista aŭ ekster-esperantista eldono

Ĉu la 'Esperantistoj kreu laŭ la kondiĉoj ekzistantaj propran eldonejon, aŭ ĉu oni interesigu gravan firmon en difinita lando pri tio? La historio de la eldono en Esperanto montras ke la du formoj de eldonado sin kompletigas. Tamen estus dezirinde ke ree grava firmo ne-esperantista interesiĝu je tio por ke ree aperu altvaloraj eldonaĵoj, kiajn ni konis inter 1910 kaj 1940.

Ja estis granda helpo por nia movado kaj por la eldono de niaj verkoj, ke siatempe la grava firmo Hachette & K-io, en Parizo eldonis la unuajn gravajn verkojn. Dank' al la financaj rimedoj de tiu-ĉi firmo, aperis sinsekve imponaj libroj; ni citu nur la kolosan romanon de Prus: *La Faraono*, la tradukon Zamenhofan de la *Biblio*, la ruĝajn librojn de LA REVUO.

Krom la firmo Hachette stariĝis aliaj eldonejoj ekz. Möller & Borel en Berlino, kaj nur-esperantistaj ekz. Presa Societo Esperantista en Parizo

por montri nur la plej konatajn ĝis 1914. Flanke de ĉi tiuj entreprenoj sur komerca bazo (la Presa Societo havis formon de Akcia Societo) floris sendependaj eldonistoj, ofte bon-intencaj Esperantistoj, dediĉintaj eventualan sed atendotan profiton al la Esperanto-Movado. Unu el tiu ĉi tipo estis la eldonisto de LA DUONMONATA, revuo eldonita de Heyn en Leipzig. La komerca sukceso estis malesperiga.

Post 1920 aperis nova grava firmo ne-esperantista, Hirt & Filo en Leipzig, kiu sisteme aperigis tre valorajn verkojn (*Originala verkaro* de Zamenhof, la impona vortaro *Esperanto-Germana* de D-ro Wüster, modelo de ĝisfundeco, la vortaroj de Bennemann kaj multaj aliaj verkoj). Impona estis la seria eldono de la Internacia Mond-literaturo, efektiva trezoro en libraro. Nur-esperantista eldonisto aperis, Vilmos Bleier, kiu dank' al speciala talento kreis ponton inter verkisto, eldonisto, presisto kaj aĉetanto. Citinda estas ankaŭ grupo de oferemaj samideanoj, La Moraviaj Esperanto-Pioniroj, kiuj per propraj rimedoj sukcesis eldoni aron da legindaj verkoj (*R.U.R.*, "*Kiel fariĝi kreanto facile kaj rapide*", "*Filozofia Vortaro*", k.a.).

Alia Esperantista eldonfirmo stariĝinta en la Nordo, estas la Sveda Esperanto-Eldonejo, al kiu oni dankas valorajn verkojn, kernon de ĉia ekspozicio (*Per balono al la Poluso*, Gösta Berling). Citindaj estas ankaŭ la eldonoj de la Esperanto Publishing Company, de la Brita Esperantista Asocio kaj, ne forgesota, de *Heroldo de Esperanto*. (Ĉar temas nur pri montrado de la diversaj tipoj de eldonfirmoj, ni ne citas pliajn eldonistojn.)

La katastrofo falinta sur la mondon ĝisradike ŝanĝis ĉion. Jam en 1936,

la firmo Hirt **devis** likvidi sian Esperanto-fakon, laŭ pli malpli milda invito de la reĝimo; *Literatura Mondo* (V. Bleier) ĉesis eldoni en 1939, kaj la fondinto de la entrepreno mortis 1940 en Parizo. Fine la milito haltigis ĉion kaj ĝiaj sekvoj forprenis la realan bazon de ĉia eldono, nome la normalan kaj konstantan vendadon.

3. Fundamentaj kondiĉoj

Utilas koni la fundamentajn kondiĉojn de entrepreno, eldonanta esperanto-verkojn. Temas pri eldonisto eksteresperantista, kapitalhava aŭ disponanta teknikajn rimedojn, ekzemple presejon modernan. Necesaj kondiĉoj de komerca sukceso estas:

1. Lando kun atentinda movado esperantista (granda ŝtato eŭropa).
2. Eldonrajto de regule vendataj lernolibroj kaj vortaroj (enlanda lingvo). Lernolibro kaj vortaro estas la pano de eldonisto.
3. Se eble, eldonanto de enlanda periodaĵo esperantista por disponi je propra reklaminstrumento.
4. Gvidanto de la Esperanto-Fako, sperta kiel Esperantisto kaj kiel fakulo en presarto, eldono, disvendo.

4. Verkoj eldonindaj

Koncerne la verkojn eldonindajn kaj eldoneblajn frontas sin du opinioj: La unua, tiu de eldonisto-libristo kiu nature deziras rapidan elvendon de verko; la dua opinio estas, ke ni eldonu nur seriozajn, eĉ sciencajn verkojn. Nu, estas konata, ja tro konata, fakto, ke facile vendiĝas agrabla legaĵo, moderna romano kaj la neeviteblaj polic-romanoj, plie noveletoj k.a.

Nu, literaturo englobas ĉion. Esperanto, kiel juna lingvo, devas

trairi saman evoluon kiel nacia idiomo koncerne la literaturon. En nacia lingvo je ĝia ekestiĝo, estas unuaj verkoj; la religiaj, eble eĉ la tuta Biblio, kalendaroj, nacia eposo, legendoj. Aperas geniulo kiu forĝas la lingvon, kreas ion grandiozan sur kiu evoluigas la literatura flanko kaj ĝin sekvas timeme laŭ la situacio geografia, ekonomia kaj politika de la koncerna popolo, sciencaj kaj teknikaj verkoj. Ĉio tio en interspaco de jarcentoj. Konkludo: Kion anoj de nacia lingvo kreis, bazas sur jarcenta laborado de la antaŭuloj. Ankaŭ nia lingvo devas sekvi saman evoluon, pli rapidan eble, sed ne sen ĝi.

Leviĝas la demando: originala aŭ traduka literaturo? Oni povas diri ke unu ne ekskludas la alian! Certe estas ke originalo en Esperanto (eĉ se ĝi estas bone legebla, flua, aventurriĉa policromano) estas preferinda, ol traduko de io samspeca el nacia lingvo. Dependas ĉiam de la valoro literatura de la verko. Sciencaj verkoj en Esperanto estos por longa tempo popular-sciencaj (kun raraj esceptoj.)

Tiurilate seria eldono (Internacia Mondliteraturo, la Biblioteko de Muusses) estas la plej praktika kaj malpli riska por eldonisto. Estus ne malbone entrepreni foje konkurson interesperantistan, pri demando: Kio devus ekzisti en Esperanto?

5. Aŭtoro kaj eldonisto

Estas tie ĉi la loko por atentigi pli vastan publikon pri la rilatoj inter aŭtoro esperantista kaj eldonisto. Aparte de lernolibro kaj nacilingva vortaro, ĉiu eldono de libro ampleksa, de ne ĝenerala enhavo, estas risko. La kontraŭo, la bone vendebla libro, ĉu ĝi donas profiton interesan por aŭtoro kaj eldonisto? Nu, laŭ la onidiroj de eldonisto, (ne pri esp. verkoj), li ĉiam perdas je verko! La

aŭtoro same ploras kaj plendas, pro gajno nesufiĉa. Kia estas la efektiva situacio? Supozante ekzemple verkon, kies vendprezo estas tri dolaroj, la libristo ĝuas rabaton de unu triono, plejofte eĉ ĝis 40%. Favorokaze eldonisto ricevas 1.75 dolarojn por ekzemplero. Deprenante flankajn kostojn, reklamadon, donac-ekzemplerojn k.t.p. ne restas pli multe ol 1.50. La preskosto por mil ekzempleroj de meza libro, kartonita moderne, 240 paĝa, kompost-spegulo 14 × 10 cm. devas esti taksata en okcidenta lando je mil dolaroj.

Kutime aŭtoro ricevas de ĉiu vendita ekzemplero 10% de la rabatita vendoprezo, do de 1.75. Restas por la eldonisto proksimume 0.55 dolaro por ĉiu vendita ekzemplero—KONDIĈE KE LA LIBRO ELVENDIĜU EN DAŬRO DE UNU JARO.

Ĉi tiuj sumoj povas varii iom, sed ĝi ne ŝanĝas la bildon. Rezultas el tio, ke ĉia eldono, kaj tio ne koncernas nur tiun de esp. libroj, estas risko. La gusto de la leganta publiko ne estas klare difinebla antaŭe, do ne komerce fiksebla kiel firma punkto. Sekve libro devas vendiĝi rapide; jaron poste jam estas aliaj aperaĵoj, altirantaj la atenton de la klientaro.

6. Konkludo

Estas ne nur dezirinde sed absolute necese, ke aperu bonaj legindaj kaj montrindaj verkoj. Por ke ili aperu necesas ke la publiko esperantista akiru, legu, kaj el tio ŝatu Esperantajn verkojn. La kooperativa eldonformo provita jam diversfoje havas certe siajn avantaĝojn. Tio ne malhelpas ke entreprenema eldonisto troviĝu por repreni la aktivecon de firmoj ĉesigintaj ĝin pro eksteraj kaŭzoj.

Hans Jakob.

Spegulo de nuntempo

La lingva malfacilaĵo dum internaciaj konferencoj

Sinjoro Jules Moch, deputito ĉe Franca Parlamento, eksministro, skribis en revuo *Monde* (aprilo 1953).

“Unu el la malfacilaĵoj de internaciaj konferencoj troviĝas en la malsama senco de sama vorto ekzistanta en diversaj lingvoj. ‘Control’ en angla lingvo signifas ‘mastreco’, ‘propraĵo’ (de kiu la esprimo franca *kontroli aferon*, t.e. ĝin posedi tenante la plimulton de la akcioj) dum *la kontrolo* (france: *le contrôle*) en ĝia klasika senco franca estas funkcio entute sendependa de la mastrumado, kiu englobas nek gvidon nek proprecon, sed nur la rajton de ekzamenado” (kontrolo laŭ la senco en Esperanto).

La rusa, lingvo de l’ amikeco interpopola

Literaturnaja gazeta (1a de julio), Moskvo, aperigis poemon pri la rusa lingvo, verkitan de jakuta poeto S. Danilov. Jen la proksimuma traduko:

Posedas mi la ŝlosilon de ĉia tera scio.
Familia estas mi kun tuta Univers’,
ĉar scias rusan lingvon mi,
ĝin, kiu englobas ame prozon kun
la vers’ . . .

Mi scias paroli ruse . . .
Kio ebligas min babili
kun negro-frato, kun dokero franca,
kun amiko mia de l’ bordoj de Koreo.

Unio nia estas Unio de popol’ liberaj,
kun ruĝa la standardo de l’ fratec’,
kutimintaj inter si por ĉion diri
en rusa idiom’, la lingvo de l’ sovjet’.

Ĝi estas ja la lingvo de laboro kaj
la lumo.
Potenca estas ĝi, klara, riĉega sen fin’.
La planedo aŭskultas kun streĉa
emocio
la lingvon de Lenin kaj de Stalin.

Latino modernigita

La latina lingvo estas, kiel ĉiu scias, la oficiala lingvo de la Vatikano en rilatoj kun ekleziaj instancoj ekster Romo. Sperta filologo-latinisto zorgas pri la korekteco de la tekstoj kiel tio okazas en ĉiuj ŝtatkancelarioj. Ne simpla tasko estas nun krei novajn vortojn aŭ trovi adekvatan esprimon por novaj aĵoj de la homa socio. Ekzemple: *Aviadilo* (*aviono*, *flugmaŝino*) estas en latina lingvo *aeronavis*, laŭvorte flugŝipo. Atom-bombo estas *pyrobolus atomicus*, dum la hidrogena bombo estas *pyrobolus ad hydrogeno*. La *British Commonwealth* tekstas *Britannica nationum communitas*, t.e. Komuneco de la Brita Naciaro; dum la Kominformo havas la belan titolon *Communistarum omnium foederatio*. Fine *Pinokjo*, la figuro kreita de Carlo Collodi (verko tradukita ankaŭ en Esperanton) fariĝis en latina *Pinoculus*.

La internacia komisiono por la armistiko

En Koreo kontrolas la plenumon de la armistiko internacia neŭtrala komisiono (ĉeĥoslovaka, pola, sveda kaj svisa militistaj taĉmentoj). Komplika estas la interrilato pro la ne-ekzisto de komuna lingvo, posedata de ĉiuj.

Sen komentario.



Tra la Mondo Esperantista



Internacia Kongreso-Pilgrimado en Lourdes

La 13an de aŭgusto komenciĝis en Lourdes (Francujo) la kongreso-pilgrimado de la katolikaj esperantistoj. La striko malebligis al multaj enskribiĝintoj la partoprenon de la kongreso. Malgraŭ tio oni povis nombri sesdekon da kongresanoj venintaj el Anglujo, Belgujo, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Italujo, Nederlando kaj Saarlando.

Laborkunvenoj alternis kun diservoj komune vizitataj. La ĉeftemo de la kongreso estis: *Universaleco de la Katolika Eklezio kaj Paco*.

Du oficialaj akceptoj honoris la kongreson. Estis unue, vendredon la 14an, je la 11.30 akcepto de ĉiuj kongresanoj pere de la Urbestro de Lourdes, kiu deklaris sian grandan simpatian al nia Movado (Esperantlingve!). Poste, sabaton la 15an de aŭgusto, post la procesio de la Sanktega Sakramento antaŭ mal-sanuloj, Monsinjoro Théas, Episkopo de Tarbes kaj Lourdes, akceptis delegacion entenantan la esperantistajn pastrojn de la kongreso, Patrinon Marie-Natalie (monaĥino, kiu per kursoj kaj prelegoj revigligis la movadon en Lourdes) kaj kelkajn laikulojn. Monsinjoro Théas asertis, ke la Esperanto-movado tre interesas lin, ke Esperanto montriĝas laŭ lia opinio, nepre necesaĵo en nia tempo, kiam oni tiel multe vojaĝadas. Li deklaris esti mem spertinta lingvajn

malfacilaĵojn dum internaciaj kunvenoj de la movado "Pax Christi". Li finparolis tiel: "Mi tutkore apogas kaj benas viajn klopodojn".

Fine, dimanĉon 16an de aŭgusto meso speciala por la kongreso estis celebrata ĉe la mirakla Groto mem, de nia samideano Patro Caroli, Roma Franciskano fama en la katolika esperantistaro pro sia efika propagandlaboro poresperanta apud la Sankta Seĝo. *D.L.*

Aŭstralio

En Tasmanio vigliĝis la movado en lokoj kie antaŭe ekzistis nur izolaj Esperantistoj. Jam formiĝis almenaŭ unu granda Esperantoklubo, en Devonport, pri kiu komplete raportis la Tasmania gazetaro, kun bildoj, kaj la klubo nun gvidas du kursojn, unu por altlernejanoj (jam kun 48 lernantoj) kaj unu por plenaĝuloj.

Britujo

Ekspozicio en Londono

Brita Esperantista Asocio kaj la Londona Klubo kunagis por lui spacon ĉe Ekspozicio de Flankokupoj kaj Manmetioj, la 17an ĝis la 30a de septembro en Central Hall, Westminster, Londono (proksime al Parlamentejo kaj Westminster Abatejo). La stando, desegnita de komitato, estis profesie konstruita kaj dum 12 tagoj 45 volontuloj deĵoris laŭvice, de la 11a horo ĝis la 21a. Vizitis la Ekspozicion 80.000 personoj,

kaj malmultaj el tiuj ne vizitis nian standon. Oni vendis lernolibrojn kaj korespondajn kursojn, disdonis multmilojn da flugfolioj kaj faris personan kontakton kun centoj da vizitantoj.

La komercan flankon de la aranĝoj prizorgis S-ro J. W. Leslie, la agema sekretario de B.E.A.




Foto : Debenham

Sur la bildo estas S-ro W. A. Gething, Prezidanto de B.E.A. (dekstre), kaj S-ro E. W. McCanlis, Prezidanto de la Londona Klubo.

Hispanujo

Hispana Esperanto-Federacio sukcesplene okazigis sian 14an kongreson en Bilbao, de la 7a ĝis la 10a de pasinta aŭgusto.

La bela kaj industria urbo de norda Hispanujo altiris preskaŭ kvincenton

da hispanaj esperantistoj. Ankaŭ partoprenis multaj eksterlandanoj, apartenantaj al sep diversaj nacioj.

Post vizito de la organizantoj al la Provincestro, kiu akceptis ilin tre ĝentile, la kongresanaro kolektiĝis en la urbodomo de Bilbao, kie la Urbestro kaj la plej elstaraj aŭtoritatuloj bonvenigis ilin kaj ricevis la dankvortojn de la gastigatoj; poste, ĉiuj gustumis la abundan lunĉon, malavare donacitan de la urbestro.

La diversaj laborkunsidoj estis tre viglaj kaj respegulis la aktivan agadon de la diversregionaj samideanoj. Radio Bilbao bone dissendis raportojn de ĉiuj programeroj, kaj specialan aranĝon, kiun multe ŝatis la aŭskultantaro, dum kiu sep diversnaciaj pruvis la taŭgecon de Esperanto.

Surŝipeta ekskurso de la urbo ĝis la maro estis tre amuziga. Oni haltis por viziti la famajn altfornojn en Baracaldo, kaj poste por gustumi la famajn rostitajn sardelojn en Santurce. Dimanĉon post prezentado de tipaj baskaj dancoj, kiuj multe plaĉis, okazis solena diservo en la baziliko sur apuda monteto Begona. Pastro J. Casanova predikis esperantlingve, emfazante la similecon de Esperanto kun la sociaj celoj de la katolika doktrino.

Lastan tagon, bela ekskurso al la nekomparebla baska marbordo kaj allogaj strandoj kaj, fine, adiaŭa vespero en la urbodomo de la urbo Eibar. Ĝis venonta jaro en Zaragoza!

Italujo

La 25a Kongreso de la Italaj Esperantistoj okazis en Como de la 5a ĝis la 9a de septembro 1953 en la grandioza Vilao Olmo. Pli ol 500 partoprenantoj kaj, el ili, ĉirkaŭ cent alilandanoj el 12 diversaj nacioj.

Rava estis la malferma prelego de nia ĉiam juna Prof. Privat pri la temo: "Esperanto kiel edukilo al mondunueco". Ĝi impresis profunde, ne nur la esperantistojn, sed ankaŭ la kunvenintajn aŭtoritatulojn. Gravaj estis ankaŭ la prelegoj de Prof. Canuto kaj de D-ro Gambirasio, prezidanto de la komerca ĉambro.

Bela kaj interesa estis la vizito al ekspozicio (en la sama Vilao Olmo) de la kolektitaj pentraĵoj de la fama virtuoza Bernardino Luini, gvidata de la Urbestro mem, kiu bonvolis regali la gekongresanojn per dolĉaĵoj kaj ĉampano. Ne mankis la kutimaj manifestacioj, kiel interkona vespero, ekskursoj (per ŝipo), oficiala balo, k.t.p.

Kiel pasintjare, Lia Ekscelenca Moŝto Einaudi, Prezidanto de la Itala Respubliko, akceptis esti honora Prezidanto de la Kongreso.

La kunvenintoj kore dankis D-ron Azzi, al kies senlaca laboro oni ŝuldas la grandan sukceson de tiu ĉi nacia-internacia jubilea Kongreso.

La venonta okazos en Sassari, grava urbo de Insulo Sardinio, de la 21a ĝis la 24a de aŭgusto 1954. La neitaloj ne pagas kongreskotizon. Ili ricevos senpage la kongreskarton, skribante al Prezidanto de la tiea Organiza Komitato, Prof. Martellotta, Casella Postale 58, SASSARI, Italujo.

* * *

Dum la ĵus finiĝinta lernjaro vigle funkciis la instruado ĉe la Katedroj de Itala Esperanto-Instituto, aldone al multaj kursoj ĉe publikaj lernejoj laŭ la cirkulero priesperanta de la Ministerio de la Publika Instruado. Ekzamenojn por akiro de instruista diplomo aranĝis Itala Esperanto-Instituto ĉe la nacia kongreso en Como. En Firenze kaj Parma bone sukcesis la "koordinataj kursoj".

Per ministeria dekreto ŝtata komerca lernejo estis titolita je nomo "Daniele Marignoni", la unua itala Esperantisto, kiu en 1889 publikigis la unuan Esperanto-lernolibron por la italoj.

Japanujo

La Federacio de UNESKO-Asocioj en Japanujo aranĝis la 1an de oktobro specialan kunsidon por paroli kun prof. Frem Nath Kirpal, vicprezidanto de Kulturaj Aktivecoj de UNESKO, kiu nun vizitas Tokion. S-ro Mijakê-Ŝihej, direktoro de Japania Esperanto-Instituto kaj de la centra komisiono de la UNESKO-Federacio (grava privata organizo kun pli ol 100 membro-asocioj) parolis en tiu ĉi okazo pri lingva problemo en la internaciaj intelektaj kunlaboroj, kaj petis s-ron Kirpal, ke li konsideru la aferon, kiel neeŭropano (li estas hindo), pli penetreme ol aliaj kaj donu apogon al ni en UNESKO-sekretariejo.

La respondo de S-ro Kirpal klare montris ne nur, ke la afero koncernas lian departementon, kaj ke li estas plene informita pri la poresperanta petskribo al UNO kun subskribo de 16 milionoj, pri la rezolucio koncerne la Internacian Lingvon en Parizo fare de UNESKO kaj la sekva enketo pri Esperanto en ĉiuj landoj, sed ankaŭ ke li havas personan intereson pri la afero. Deklarinte, ke li persone aprobas Esperanton, S-ro Kirpal demandis ĉe s-ro Mijake pri la nombro de Esperanto-parolantoj en Japanujo. La respondon de s-ro Mijake kompletigis du eminentaj oficistoj de la Federacio kaj de la nacia UNESKO-komisiono mem, kiuj certigis, unue, ke en preskaŭ ĉiuj universitatoj en Japanujo troviĝas Esperanto-rondoj, kaj due, ke la japana registaro estis sendinta al la

UNESKO-centro informojn pri la japana Esperanto-movadoredaktitajn senmodife laŭ la raporto prezentita de Japana Esperanto-Instituto.

* * *

La rektoro de la Universitato de Tokio en intervjuo kun la organo de la Societo de Poŝtamikoj, organizo de junaj korespondemuloj (kun 400.000 membroj !) konsilis al la junuloj lerni Esperanton por korespondi kun plumamikoj en Eŭropo kaj Sud-ameriko. Li diris, interalie, “Korespondante per Esperanto vi ne havos lingvan handikapon kaj vi ne bezonas humiliĝiantaŭ okcidentanoj”. Post tiu intervjuo la oficistoj de la societo komencis lerni Esperanton, organizante kurson en sia sidejo en Ministerio de PTT kaj pli ol 10 oficistoj fervore lernas de junio sub gvido de s-ro Mijake, direktoro de JEI.

* * *

La 40a Kongreso de Japanaj Esperantistoj okazis la 19–21 Septembro en Okayama. Ĉirkaŭ 250 membroj ĉeestis la kongreson, kies prezidanto estis Prof. H. Yagi. La guberniestro de Okayama, D-ro Miki, salutis la ĉefkunsidon en Esperanto. Same faris la 80-jaraĝa direktoro de SANYO Virinaj Lernejoj, F-ino Kaziŝiro. Tiu fraŭlino antaŭ 47 jaroj partoprenis la unuan Esperanto-kurson en Japanujo, kiun organizis S-ro E. Gauntlett en la nunjara kongresurbo.

Por la unua fojo okazis UEA-kunsido, kaj en tiu oni elektis kiel Ĉefdelegiton en Japanujo D-ron H. Yagi.

Svedujo

En Frostavallen meze de Skanio, la plej suda provinco de Svedujo, la 9a ĝis 16a de aŭgusto 1953 okazis la Sveda Somera Semajno. Aranginto estis la Sveda Esperanto-Instituto en kunlaboro de la Sveda Unesko-Konsilantaro kaj la Sveda Instituto por Informado en Eksterlando. Ankaŭ la sveda ŝtato subvenciis la kurson. La praktikaj detaloj estis komisiitaj al la Sveda Esperanto-Federacio, aŭ pli ĝuste al ĝiaj prezidanto, Jan Strönnne, kaj sekretariino, Gulli Svensson, kiuj kun la helpo de la Esperanto-grupo de Malmö tre sukcese aranĝis la semajnon. Tiu sendube donis al la partoprenantoj interesajn kaj instruajn spertojn, kiuj postlasis la plej plaĉajn memorojn pri agrable pasigita feriokurso. La vetero, kiu ne povus esti pli bela, kontribuis al la brila sukceso. Partoprenis sesdeko da personoj el 12 nacioj.

La prelegtemaro estis “Internacia Kulturinterŝanĝo”. Prelegis Sinjorino Julia Isbrucker pri la mondfederacia movado, ĝiaj ideoj kaj diversaj aspektoj, pri la rolo de internaciaj vojaĝoj por akceli larĝan internacian koncepton kaj pri la internacia eksperimento en la Pestalozzi-vilaĝo, Svislando. Prof. Ivo Lapenna prelegis pri UNESKO kaj ĝia rolo, la ĉefaj internaciaj politikaj organizaĵoj kaj specialigitaj institucioj, pri la hodiaŭaj politikaj kaj juraj rilatoj inter la popoloj kaj pri patriotismo, internaciismo kaj kosmopolitismo. Inter la svedaj prelegantoj rektoro Karl Söderberg parolis pri la popola alilerno—skandinava kontribuo al la kleriga laboro—kaj pri edukado al humaneco. Doktoro John Stenström kondukis la aŭskultantojn tra la sveda esperantigita literaturo kaj fine

Sinjoro Strönne parolis pri la rolo de la fakaj organizaĵoj de UEA kaj pri internacia kulturinterŝanĝo—nun kaj poste. Kelkaj prelegoj estis akompanataj de filmo, lumbildoj kaj diskutado. Ĉio atestis pri la taŭgeco de Esperanto kiel perilo por interŝanĝo kaj disvastigo de kulturaj kaj sciencaj valoroj.

Ekster ĉi tiu serioza parto de la programo la partoprenantoj ja havis materiajn favorojn; abunda kaj bonega manĝo, komforta loĝejo kaj hela naturo kun promenoj kaj banado.

Oni ankaŭ faris ekskursojn per aŭtobuso i.a. al Hälsingborg ĉe la marloko Oresund, al la katedrala kaj universitata urbo Lund kaj al Malmö, en kiu lasta loko la membroj de la tiea grupo prezentis tre ĝuindan distran programon kun teatraĵetoj, muziko, kantado kaj skaniaj popoldancoj.

En la vesperoj oni ankaŭ sin amuzis per ludoj, muziko, kantado, dancado k.t.p.

Do entute tre bela, ĉarma kaj memorinda semajno, pro kiu la aranĝintoj meritas nian plej koran dankon.

Birger Gerdman.

Svislando

Okaze de la kvindekjara ekzisto de la Svisa Esperanto-Societo, okazis regionaj kunvenoj en Morges kaj Herisau. Ambaŭ estis dediĉitaj al tiu ĉi datreveno. En *Morges*, nia senlaca kunbatalanto, Charles Jayet kaj filinoj organizis tiun kunvenon, kiu brile sukcesis. Memorigaj paroladoj de D-ro Edmond Privat, Ch. Jayet, Hans Jakob, kaj de la prezidanto de SES, Hans Herrmann formis la kadron de la kunveno. Ĉeestis samideano Ralph Harry, la nova Ĝenerala Konsulo de Aŭstralio

en Ĝenevo, kiu parolis en flua Esperanto pri Aŭstralio, kontinento promesplena. Agrabla kunesto de la kvindek samideanoj kiuj sekvis la inviton, bonega tagmanĝo kaj “Kvinhorteo” kompletigis la aranĝon.

En *Herisau*, je 27a septembro, S-ro Schwendinger, Prezidanto de la tiea grupo, malfermis la Regionan Kunvenon, salutante la kunvenintojn en la nomo de sia grupo, kaj donis la parolon unue al S-ro Kürsteiner, St. Gallen, kiu rakontis pri la fondiĝo de Svisa Esperanto-Societo antaŭ 50 jaroj. Li citis nomojn de tiuj viroj kiel Hodler, Privat, Stettler k.t.p. kiuj ne nur servis al nia landa organizaĵo, sed ankaŭ en la internacia movado staris en unua vico.

Tre interesajn raportojn faris al ni la ĉeestintaj partoprenintoj de la Kongreso en Zagreb, S-roj Noll kaj Walder kaj F-ino Rietmann. La kunvenon partoprenis 18 gesamideanoj kaj ni ĝojas pri bela sukceso, kaj admirinda akcepto en la kongresurbo.

Poemoj de Zamenhof

En sia bonega artikolo (p. 193/5) Reto Rossetti atentigas pri la fakto, ke ni posedas tre malmultajn originalajn poemojn de Zamenhof.

En *The British Esperantist* (p. 158, 1952) oni reprenis poemon Al “*La Esperantisto*”, aperintan en *La Esperantisto* (Nov. 1889). Subskribis ĝin “Amiko”. Tre verŝajne—preskaŭ certe—*Amiko* estis unu el la diversaj plumnomoj de Zamenhof. Tiu hipotezo estas des pli verŝajna, pro la fakto, ke Zamenhof en posta numero (*B.E.* p. 203, 1952) defendis gramatikan formon en tiu poemo.

M. C. Butler, Anglujo.



39-a Universala Kongreso de Esperanto

Poŝtfako 140, Haarlem, Nederlando

31-an julion—8-a aŭguston 1954

Oktobron 1953

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro

Perantoj : Ŝanĝoj : En la Unua Bulteno sub “Danlando” forstreku la nomon de S-ro Ing. L. Jakobsen. Sub “Svedujo” forstreku “Sveda Esperanto-Federacio”. El Svedujo eblas sendi pagon rekte al Haarlem.

Pagmaniero : Kiuj pagas per banko bonvolu noti, ke la nederlandaj bankoj deprenas por maklero f.0.50 de pagoj el eksterlando. Tiun sumon aldonu al la sumo pagebla al nia konto. Prefere pagu tro multe ol tro malmulte ĉar ekstraĵon ni skribas je la kredito de la kongresano.

Konsilinde estas ke pluraj personoj pagu kune por eviti unuopajn maklerojn. Cetere per Internacia Poŝtmandato oni evitas tiujn ĝenojn. Notu tre bone, ke Perantoj de la kongreso (kun eventuala escepto de karavangvidantoj) akceptas nur kotizojn. Povas esti ke Peranto postulas malgrandan krompagon por kovri siajn elspezojn.

Sendante pagon al Haarlem nepre samtempe sendu ankaŭ la Aliĝilon. Sendante pagon per Peranto sendu al li la Aliĝilon.

Korespondado : Post aliĝo direktu ĉiujn petojn pri informo senpere al la L.K.K. por ŝpari tempon. Aldono de Internacia Respondkupono (aĉetebla en vialanda poŝtejo) helpas. La oficiala lingvo de la kongreso estas ESPERANTO. En leteroj uzu **nur** tiun lingvon. Ĉiam citu vian kongresan numeron en korespondaĵoj.

La tuta sistemo de administrado estas bazita sur la numeroj.

Nombrolimigo : Pro la limigi enteneblo de salonoj kaj pro malfacilo loĝigi kongresanojn me en la turisma sezono la L.K.K. avertas, ke ĝi verŝajne devos limi la partoprenon en la kongreso. Fr aliĝo sekve estas konsilinda.

Tempolimo : Kiel en antaŭ kongresoj, kaj konforme alla Kongreso Regularo, la L.K.K. anoncas, ke lasta dato por aliĝo al la kongreso estas la 30-a de junio 1954.

Nome de L.K.K.

Mason Stuttard, K.K.S

38-a Universala Kongreso de Esperanto (Fina Statistiko)

Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭst 57, Belgujo 10, Brazilo 2, Britujo 1, Danlando 71, Ebura Bordo 4, Egipto 1, Finnlando 11, Francujo 2, Germanujo 110, Gvatemalo 1, Hispanujo 1, Indonezio 1, Italujo 1, Izraelo 1, Jugoslavio 720, Maroko 1, Nederlando 43, Norvegujo 69, Novzelando 3, Pollando 1, Portugalujo 1, Sarlando 1, Svedujo 240, Svislando 35, Turkujo 1, Usono 7, Venezuelo 1, Sumo 1760 el 30 landoj.

Post la kongreso restis 311 paketoj da dokumentoj, verŝajne de venintoj, kiujn L.K.K. sendis al koncernaj personoj.

Mason Stuttard, K.K..

I. L. E. I. kunvenis en Zagreb

INTERNACIA Ligo de Esperantistaj Instruistoj kunvenis dum la Universala Kongreso en Zagreb. La rutinaj aferoj estis pritraktitaj en privata kunsido de Estraranoj kaj reprezentantoj. Pli interesa estis la publika pri la temo: "Kiel la hejmo influas la lernejon? Ĉu gepatraj asocioj havas utilon?"

Fino Dedieu (Francujo) donas kelke da antaŭaj informoj, direktas apartan saluton al la Jugoslavia Esperanto-Societo de Instruistoj, kaj anoncas, ke pri la nuna kunsido oni povos legi sur la proksima "Informilo de I.L.E.I." (decembra numero de la dulingva gazeto *Esperanto et Culture*, nun antaŭmendebla).

Poste S-ro Dahl (Svedujo) faras brilan enkondukon al la temo. Por la infanoj la unua tago en la lernejo estas tre grava. Pri tiu transiro de la hejma al la lerneja mondo kaj ĉe poste necesas kunlaborado inter gepatroj kaj instruistoj, ĉar manke de reciproka kompreno, grava povas esti la difektiĝo por la infana animo. La instruisto celu konvinki la gepatrojn, ke la lernejo devas eduki la infanon laŭ ties kapabloj, por ke li estu bona homo kaj civitano, ne por ke li fariĝu genia. Pri puno la instruisto devas trakti la infanon sammaniere kiel la gepatroj, ĉe se tiuj konas nur la batmetodon, por ke la infano konsciu pri tio, ke la gepatroj kaj instruistoj havas la saman celon, la saman edukmetodon. La kunlaboro estas do necesa; sen ĝi estas ŝiroj en la infananimo. Por tio la ekzisto de gepatra asocio estas bona. La parolanto opinias, ke ju pli malmultnombra estas la asocio des pli efika estas la kunlaboro.

S-ro Novljan (Jugoslavujo) rakontas pri siaj antaŭmilitaj spertoj en gimnazio. Tiam ekzistis oficiala asocio de gepatroj kun kotizo por helpi la lernejon. La kunvenoj okazis tre formale kaj sen intimeco. Li ne ŝatis tiun sistemon, kaj per propra iniciato okazigis ĉiumonate "eksterleĝe" specialan kunvenon kun paroladeto al la gepatroj kaj al la instruistoj, kies ĉeesto estis deviga. Post la parolado oni babilis en grupoj neformale formitaj.


De D-rino Barana (Italujo) oni ekscias, ke ne ekzistas en ŝia lando gepatra organizaĵo escepte en kelkaj lokoj. En ŝia gimnazio unu horo ĉiusemajne estas dediĉita al interrilatoj inter gepatroj kaj profesoroj. La sperto estas nebona; la gepatroj kaptas la okazon nur por akuzi la instruistojn pri ĉiu malsukceso de la lernantoj.

Sekvas la raporto de la porinstruista seminario de Montauban (Francujo) pri sia aplika elementa lernejo kun Gepatra Rondo. En la kunvenoj okazas post paroladeto liberaj diskutoj pri variaj temoj; infano kaj kino, infanaj legaĵoj, infanaj bezonoj, seksa edukado, trompo en la lernejo (interkopiado de taskoj), mensa stabileco, k.s. La rezulto estas bona.

S-ro Gregor opinias dezirinde ke interrilatu gepatroj kaj instruistoj. Kunvenoj estu liberaj, nedevigaj ĉe por la instruistoj.

S-ro Muziĉ (Jugoslavujo) aldonas aktualajn informojn pri sia lando. La kunvenoj estas nun pli intimaj, laŭ la klaso de la lernanto; gazeto estas eldonata por la gepatroj. Estas pluraj societoj, inter ili tiu "Niaj

daŭrigo sur paĝo 326



Centro de Esploro kaj Dokumentado

300, West End Lane, London, N.W.6, Anglujo

Enketo pri la Socia Konsisto de la Esperanto-Movado

Komence de la jaro 1952 CED entreprenis enketon pri la socia konsisto de la Esperanto-Movado. Tiun tre malfacilan taskon prenis sur sin S-ro C. J. Keur, kunlaboranto de CED el Hago (Nederlando). Pri siaj klopodoj kaj ampleksa laboro S-ro Keur ĵus sendis al la Sekretariejo de CED tre detalan raporton, el kiu ni ĉerpas jenajn ĉefajn punktojn:

(1) La enkonduka esploro estis limigita al la landaj asocioj, aliĝintaj al UEA, do al esplorterenon de proksimume 20.000 personoj en 32 landoj. Al la menciitaj landaj asocioj aŭ al diversaj kunlaborantoj en tiuj landoj estis senditaj detalaj instrukcioj kun akompanaj tabeloj.

(2) Dum la U.K. en Oslo estis pridiskutita la ĝistima stato de la enketo. En la I-a kaj II-a sekcioj de la kongreso S-ro Keur faris raportojn, kiujn sekvis sufiĉe vigla diskuto. El la diskuto evidentiĝis, ke la plimulto de landaj asocioj ne disponas pri kompetentaj specialistoj por konduki la enketon sur kontentiga scienca nivelo. Pro tio S-ro Keur decidis limigi la enketon al nur 10 demandoj.

(3) La laboron entreprenis kaj laŭ ebleco kontribuis per informoj la Argentina, Belga, Franca, Irlanda, Kroata, Novzelandaj kaj Svisa landaj asocioj. La aliaj landaj asocioj povis bedaŭrinde nenion entrepreni. Eĉ la landaj asocioj, kiuj kontribuis al la enketo, ne povis tion fari komplete: nur relative malgranda parto de la esperantistoj en la koncernaj landoj

povis esti enketita. Pro tiuj kaŭzoj la rezultoj de la enketo *ne povas* esti konsiderataj kiel science ĝustaj.

(4) Laŭ tiuj mankaj informoj kaj kun seriozaj rezervoj el scienca vidpunkto, la rezultoj estas jenaj:

La Movado en la enketitaj landoj konsistas proksimume el 2/3 de *viroj* kaj 1/3 de *virinoj*. Laŭ la *aĝo*, proksimume 80% de la Esperantistaro apartenas al la meza grupo, nome al la grupo inter 21 kaj 64 jaroj. Proksimume 5% apartenas al junularo (5-20 jaroj), dum 15% apartenas al la grupo de personoj kun la aĝo de pli ol 64 jaroj. Laŭ la *profesio*, proksimume 30% apartenas al la t.n. industria grupo kaj 30% al la grupo de "servoj", nome oficistoj, instruistoj ktp., dum 40% apartenas al diversaj aliaj okupoj (agrikulturo, komerco, transporto, liberaj profesioj). Laŭ la *instruiteco*, ĉ. 80% havas elementan lernejon, 15% mezgradan kaj 5% universitatan edukitecon.

S-ro Keur finas raporton per jenaj vortoj: "La informoj akiritaj ne povas konduki al ĝeneralaj konstatoj pri la socia konsisto de la Esperanto-Movado. Ne estas ĉi tie la loko por fari pli detalajn komentojn pri la kaŭzoj."

CED, sekve, publikigas la suprajn rezultojn kun ĉiuj necesaj rezervoj kaj esperas ke en pli konvena tempo ĝi povos entrepreni similan enketon eluzante la ampleksajn laborojn jam faritajn de S-ro Keur. CED esprimas al S-ro Keur kaj al ĉiuj kiuj kunlaboris en tiu ĉi afero, sian koran dankon.

Laboro de D-ro Wajsblum en Islando

La kunlaboranto de CED D-ro M. Wajsblum sendis al la Sekretariejo de CED detalan raporton pri sia laboro en Islando en la pasinta printempo. Jen la ĉefaj rezultoj :

(1) Kvin kursoj por komencantoj aŭ progresintoj en Reykjavik kaj Vestmannaeyjar ; (2) por esperantistoj 4 prelegoj en Reykjavik kaj 6 en Vestmannaeyjar ; (3) du publikaj paroladoj en Reykjavik kaj unu en Vestmannaeyjar ; (4) en Vestmannaeyjar ekspozicio sub la titolo “Kio okazis en Varsovio de 1939 ĝis 1944” kunigita kun ekspozicio de esperantaj libroj kaj gazetoj (300 vizitantoj en 2 tagoj) ; (5) kvin grandaj artikoloj en la gazetaro de la ĉefurbo kaj dudeko da mallongaj informoj ; (6) intervjuo ĉe Radio-Reykjavik ; (7) starigita Esperanto-fako en la publika biblioteko en Vestmannaeyjar ; (8) organizo de la gazetara servo ; (9) koncerto de polaj popolaj kantoj en Islanda kaj Esperanta tradukoj kun antaŭparolo akcentanta la rolon de Esperanto kiel kultura peranto ; (10) internacia interlerneja korespondado (du lernejoj—unu en Reykjavik kaj unu en Vestmannaeyjar — eksperimentos per instruado de geografio bazita sur internacia korespondado).

CED gratulas al D-ro Wajsblum pro tiu bonega laboro.

Artikolo pri UK en grava revuo

“Bulletin NGO-ONG”, la oficiala organo de la Unio de Internaciaj Asocioj kun sidejo en Bruselo, aperigis en sia Aŭgusta-Septembra n-ro 3-paĝan artikolon de Prof. I. Lapenna pri la Universalaj Esperanto-Kongresoj. En la artikolo estas prezentitaj la organizo de niaj UK, iliaj celo kaj laboro, diversaj kulturaj aranĝoj kaj la signifo. La revuon

ricevas, inter la aliaj, ĉ. 1.000 internaciaj registaraj kaj neregistaraj organizaĵoj. Menciinde, ke la artikolo estis verkita laŭ la peto de la redaktoro de la revuo.

I. L. E. I. (daŭrigo de paĝo 324.)

Infanoj”, teritorie organizita, ebligas gravan kunlaboron inter gepatroj kaj instruistoj. Li invitas por la sekvonta tago la kongresanojn al vizito de la Pedagogia Muzeo kun “hejmo” de la instruistoj, kaj de la Pedagogia Instituto de la Zagreba Universitato, kie oni prelegos al ni pri la lerneja sistemo en Jugoslavujo.

S-ro Boyet (Francujo) prezentas raporton senditan de lia kolego Inspektoro Cadenel pri la diverseco de la gepatraj asocioj, kies plej oftaj celoj fremdas al eduka kunlaboro inter hejmo kaj lernejo, sed rilatas al jen politika, jen religia, jen kultura, jen sporta intereso.

Male al tiu ĝenerala situacio, S-ro Beau rakontas pri la neordinara kaj tre fruktodona kunlaboro ĉe la “nova liceo” en Marseille, kie la multmembra gepatra asocio postmilita fondita multe helpas.

Post danko de F-ino Dedieu al la parolintoj kaj ĉeestantaro disvendiĝis la *Universala Deklaro pri Homrajtoj* en simpligita teksto por lernejoj.

En la sama tago okazis vizito al la infana (pionira) urbo, sed bedaŭrinde la pioniroj estis for. Ili jam libertempis. Oni povis nur aŭdi la klarigojn de gvidanto kaj vidi la dometojn kaj laborejojn.

Vladimir Muziĉ kaj
Jeanne Dedieu.

Interesuloj mendu la 2 venontajn numerojn de la “Informilo de I.L.E.I.” (decembra kaj maja) por 3 respondkuponoj kune (aŭ unu numeron por 2 respondkuponoj) al S-ro Dumarquez, Anzin St. Aubin, Arras, P. de C., Francujo.

A. Sauvageot :

Sonimitaj Vortoj

Ĉu *rap-rap* aŭ *coin-coin* ?

Unu el la duonveraĵoj plej ĝenerale akceptataj estas, ke la homa lingvo naskiĝis el la onomatopeo. Al kiuj eraroj, al kiaj falsaj etimologioj tiu principo povis konduki, reliefigas la jena artikolo de S-ro Sauvageot, profesoro de lingvoj finna-ugriaj ĉe la Lernejo por Orientaj Lingvoj.

LA granda dana lingvisto Kristoffer Nyrop rakontas, ke li foje troviĝis kun unu el siaj francaj kolegoj. La du scienculoj promenadis en la ĉirkaŭaĵo de Kopenhago. Ili alvenis ĉe laĝeto, en kiu naĝis kelkaj anasoj. La dano ekkriis: "Jen rap-rapoj!", montrante la birdojn. "Kio?" demandis la franco surprizite. "Sed estas anasoj! Kaj la anasoj faras *coin coin*. Vi cetere nur aŭskultu ilin kun iom da atento: vi konstatos, ke la anasoj eligas sonon tre nazigitan. Anaso kiu kapablas sin esprimi dece neniam diros *rap-rap*."

Kaj Nyrop starigis la demandon: "Kiu pravas? Ĉu la francaj infanoj kiam ili asignas *coin coin* kiel lingvon al la anasoj? Ĉu la danaj infanoj kiuj estas partianoj de *rap rap*?"

La bedaŭrata dana lingvisto rimarkigis tiam, ke li efektive perceptas nazigitan elementon en la krio de la anasoj, kiu estas bonege esprimita per la *coin coin* de la francaj infanoj sed ke, aliflanke, li ankaŭ kredas aŭdi sonon klaran, kiu ne malpli bone estas ripetita per la *rap rap* de la danaj infanoj. Li diras aldone, ke en Germanujo oni diras *gack gack*, aŭ *gick gack*, aŭ ankaŭ *pack pack*, aŭ *quack quack*. La rumano havas *mac mac*, la italo *qua qua*, la ruso *kriac*, la anglo *quack*.

Tie ĉesas la scienco de Nyrop, sed li estus povinta daŭrigi sian esploron, kaj li estus trovinta, ke la hungara

anaso faras *hap hap*, kaj la anasoj el aliaj landoj aliajn bruojn. Tiel ke koncerto de la anasoj tra la mondo nur estigas malagordan muzikaĉon.

Ni kredas esprimi per rimedoj de nia gepatra lingvo ion, kion ni opinias imitita de la naturo, kaj sufiĉas kompari tion, kion ni diras, kun tio, kion diras la aliaj, por tuj kompreni, ke nia imitaĵo nur havas valoron por ni. Por la aliaj, ĝi valoras nenion.

Kaj kiel povus nia imitaĵo havi valoron por aliaj ol ni mem, konsiderante ke ĝi esprimiĝas nur per la sonoj de la franca lingvo. La anaso en nia lando elparolas, por niaj oreloj, nazigitan sonon, ĉar la franco konas nazigitajn sonojn, dum la dano ilin ignoras, kaj do ne povus ilin aŭdi.

* * *

Ni imitas la kriojn de la bestoj kaj la bruojn de la naturo helpe de la sonoj, kiujn nia lingvo disponigas al ni. Ni cetere ne kapablus fari ion alian, eĉ se ni tion dezirus. Kia-maniere nia brava franca porko povus grunti kun la samaj sonoj, kiel la porko el Finnlando? Tiu ĉi faras *oĥ oĥ*. Nu, nia simpatia porko el Francujo ne kapablas eligi sonon skrapantan la gorĝon, kiel la germana 'ĥ'. Kaj kiel, tre prave, rimarkigas la dana scienculo, la porko el Finnlando siavice estus en granda embaraso, por interkompreniĝi tiurilate kun sia dana amiko, kiu eligas

allogan *of of*, ĉar la Finno ne konas la 'f', kaj ĉiu Finno kiu sin respektas estas tute nekapabla diri 'f'. Estas vere strange, ke en la porkejoj sonadas malsimilaj blekoj, laŭ la lando en kiu oni troviĝas. En Hungarujo la porkoj estas multenombraj; ili faras *rof rof*.

Tiuj konstatoj kondukas al konkludoj pli ĝeneralaj. Ili permesas trakti laŭmerite la asertojn de tiuj, kiuj klarigas la devenon de la lingvoj, sin apogante precize sur tiuj sonimitaj vortoj, kiuj konsistigus, laŭ ili, la unuajn balbutojn de la lingvoj. La homo, en la nokto de la tempoj, estus ekpensis imiti la kriojn de la bestoj kaj la bruojn de la naturo. Iom post iom, li estus liginta, en sia menso, tiujn onomatopeojn kun la kaŭzo kiu estigis ilin, kaj li estus nominta la bestojn kaj la aĵojn laŭ tiu normo. La bruo de la vento ekzemple estus doninta al la germanoj la verbon *braŭsen*, kiu respondus al la *brusa* de la svedoj kaj al la *bruse* de la danoj. La franca vorto *bruit* prezentus, laŭ kelkaj, ian analogion kun tiuj vortoj, kvankam en ĝi mankas precize la sibla litero 's', kiu donas al la germanaj vortoj ilian imitan sonon. Vere estas, ke ni retrovas ĝin en la parenca *bruissement*.

Se ni akceptus tiun tezon, ni povus nin demandi, ĉu la bruo de la vento ne estas efektive sugestita per la literoj 'b' kaj 's', sed ni iru pli malproksimen, kaj esploru aliajn lingvojn. La hungaro diras *zug*, la finno *humise*. Kaj ni ne triumfu tro frue pro la enesto de 's' en la finna vorto; estas sufiksaĵo kiu servas por formi derivitajn verbojn. La responda substantivo estas *humina*, el kiu malaperis la 'b' kaj 's'. Ne estas facile por la finno aŭdi 'b' en la muĝado de la vento kiu trakuras liajn

vastajn arbaregojn, ĉar 'b' ne ekzistas en la finna alfabeto.

Ni do ĉiam rekonstatas la samon: ni imitas la bruojn de la naturo helpe de la rimedoj sonoraj pri kiuj ni disponas, kaj kiujn ni heredis. La sonimitaj vortoj ne estas la devena fonto de la lingvo; ili estiĝas per la rimedoj kiujn la lingvo disponigas al la popoloj. Se ne, oni ne povus koncepti ke la ĉevalo ne estas nomita ĉie laŭ sia bleko. Nu, la latina *equus* (greke *hippos*) kontrastas kun la rusa *losad*, la turka *at*, la hungara *lo*, la finna *hevon*, la sveda *hast*, la ĥina *ma*, la mongola *morin*, k.t.p. Ankaŭ granda estas la malakordo kiam temas pri la bleko: germane *wiehern*, dane *vrinske*, turke *kisne*, mongole *incaga*, portugale *rinchar*, k.t.p.


* * *

La bleko de la ĉevalo estas esprimita per vortoj, kiujn ĉiu lingvo elektis dum la disvolviĝo de sia historio, pro kialoj ofte malfacile distingeblaj, sed kiuj neniel rilatas al la ekzakta imito de la aŭdita bruo. La bleko ricevas nomojn kiuj ne estas malpli arbitraj en sia speco ol tiuj, per kiuj la besto mem estas nomita.

Pri tiu lasta kazo, ni simple rememorigu, ke la germana vorto por ĉevalo estas *Pferd*, pruntita de la latina *paraveredus*, (poŝtveturila ĉevalo), kies unua parto (*para*) estas de greka deveno, kaj pri kies dua parto la etimologiaj klarigoj ĝis nun donitaj tute ne estas konvinkaj.

La vortoj per kiuj ni signas aĵojn kaj ulojn estas do hereditaj de longa tradicio. Arego da generacioj transdonis ilin al ni, kaj ilia formo rezultas el la ŝanĝiĝoj kiujn ili spertis tra la jarcentoj. Eĉ kiam ni kredas imiti la kanton de la koko aŭ la krion de la

fino sur paĝo 342



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵajn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevas nur mencion.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

*La recenzinto estas libera en sia prijuĝo de verkaĵo.
Lia opinio ne ligas la Asocion aŭ la Estraron de U.E.A.*

***La Normandaj Rakontoj**, Guy de Maupassant. Trad. Roland Dupuis. Eld. Eldona Societo Esperanto, Stockholm. 22.5 × 16 cm. 212 paĝoj, bind. 23ŝ. 6p., afranko 6p.

Mi estas unu el tiuj legantoj, kiuj ne tro sin ĝenas pri la ekstera aspekto de libro, se nur la enhavo estas bona. Multaj el miaj trezoroj estas presitaj sur malmultekosta papero kaj broŝure binditaj. Ili tamen havas unu gravan malavantaĝon. Kiam mi volas konvinki amikon pri la valoro de Esperanta literaturo, mi trovas ĉi tiajn librojn tute senutilaj, ja eĉ malutilaj. Libro de alloga aspekto, tamen, nur kuŝante kie iu sensuspekta konato povas ĝin vidi, funkcias kiel silenta sed tre efika propagandilo kaj ofte invitas demandojn pri la enhavo kaj la lingvo. Ĉi tion mi spertis pri la libro ĉi tie recenzata. Ĝi estas sendube unu el la plej belaj libroj ĝis nun aperintaj en nia lingvo. La preso kaj bindo estas bonegaj kaj ĝi enhavas multajn ilustraĵojn, inkluzive koloritajn fotojn.

Tamen ĉu enhave ĝi egalas sian



La Monto Sankta-Mikaelo

allogan eksteron? Nepre jes! Stile ĝi estas modela; kaj rilate la intereson de ĝia enhavo, mi legis ĝin kun kreskanta ĝuo ĝis la lasta paĝo. Ĉi tie mi ne forgesu mencii inter la meritoj de la libro la ĉarman antaŭparolon de la tradukinto kaj la valoran enkondukon de Henri Defontaine. Mi konfesas, ke mi havis la jukon kompari la tradukon kun la franca originalo, sed feliĉe mi unue legis ĉi tiujn vortojn en la antaŭparolo: "Oni ja ĝenerale ne aĉetas libron por kritike kompari tekstojn sed por tute libere ĝui ties enhavon." Kun ĉi tiuj vortoj mi tute konsentis, kaj en tiu spirito mi legis la verkon.

La titolo sufiĉe bone priskribas la enhavon de la verko. Ĝi konsistas el serio da rakontoj, kies temoj fontas el la vivo, kutimoj kaj karakteraj tipoj en kamparana regiono. En la vortoj de la tradukinto, la Normandoj estas "gento ja ruza, drinkema, ĉikanema kaj ŝparegema, sed ankaŭ fortika kaj energia". Kompreneble pli noblaj ecoj ankaŭ ekzistas, sed almenaŭ en la rakontoj ili estas ĉiam venkataj de la kamparana ŝparemo, ekzemple en la rakonto "*Peĉjo*".

Nur unu malfavoran kritikon mi havas. La tradukinto ne aldonis klarigan liston de neologismoj ne troveblaj en *Plena Vortaro*.

Resume, ĉiu literaturamanto kaj propagandisto, kiu havas la necesajn rimedojn, nepre aĉetu, legu kaj dismontru ĉi tiun libron.

K. Stephenson.

***Poemoj de Omar Kajam**, el la persa originalo verse tradukis G. Waringhien. 60 paĝoj, 14 × 18 cm. Eldono de S.A.T. Prezo 5ŝ. 6p., afranko 4p.

La tradukinto skribas: “La poemetoj de Kajam estis malkovritaj en 1859 de angla poeto Edward Fitzgerald, kiu tradukis, kun granda fideleco kaj iaj kontraŭsencoj, 49 el ili, kunfaris 44 aliajn el versoj pruntitaj el du aŭ pluraj robaioj, kaj tiris la ceterajn el sia propra, similetosa inspiro. Lia poemo (ĉar li arte kunligis ĉiujn kvarojn per trakuranta faden) estas ĉefverko de la angla literaturo, sed prezentas ne tre ĝustan bildon de la persa originalo.”

La nuna verko, kontraŭe, vicigas la poemojn laŭ ordo de aŭtentik-probablo kaj tradukas ilin fidele. Kiel kompariĝas la subjektiva kunfando de Fitzgerald kun la objektiva prezento de Prof. Waringhien?

Cent re-eldonoj sufiĉe atestas la sorĉon de la kordoj, kiujn Fitzgerald tuŝis. Ili estas: la pasemo de la homa vivo, neado de vivo posttomba, kaj alvoko eluzi dum ni povas la “realajn” plezurojn de vino, muziko kaj kunesto kun la amata. Al tio aliĝas la refreno, ke herooj kaj dinastioj, same kiel ni mem, fariĝas tero kaj argilo, por retroviĝi eventuale kiel poto, vinkruĉo, herbo, floro; kaj la kredo, kun protesto, pri antaŭdestino kaj fatalismo. Konklude Kajam pridubas saĝulojn kaj dogmojn kaj rifuĝas save al la hedonismo—de la vino antaŭ ĉio.

La traduko de Waringhien enhavas precize duoble da strofoj (150) ol la populara versio de Fitzgerald (li faris plurajn). El tio ni povus atendi bildon pli multflankan, sed eble malpli integran pro la scienca ordigo de la materialo. Sed dank’ al la

alternado de la ĉeftemoj ni trovas, male, similan unuecon ĉe la sumo. Tiu Perso de la 11-a jarcento aperas al ni en animo kaj karaktero pli multfaceta, ol ĉe la Anglo; ĉar ne temas ja pri kompromiso inter tradukanto kaj poeto, sed pri skrupula respegulo. Ni trovas, ke la amo por Omar Kajam estas amo Platona al gracia knabo. La dolĉa melankolio, kiu ĉe Fitzgerald tranuancas la tuton, ricevas en Esperanto pli klarajn trajtojn: en varia gamo ludas fatal-sento, defio, amekzalto, ribela bonhumoro kaj sprito. Forfalas la gazo de angla romantiko XIX-jarcenta kaj aperas la vivanta persono.

La traduko estas tiel flua kaj sonora, ke oni ne tuj perceptas ĝian teknan virtuozecon. La rim-rimadoj estas tre fekundaj. La rim-uzo de interjekcioj (el, ba, oj) kaj la reprodukto de la refren-rimoj de la originalo (ekzemple animo vi foriros—intimo vi foriros—pilgrimo vi foriros) estas aparte atentindaj. Kaj kiel lerte Waringhien riĉigas la nepurajn rimojn ĝis plena valoro—jen per anagramo de la rimsilabo (**paktas** — **kaptas**; **pentru**—**ĉarpentu**) jen per antaŭapogo (**daŭri**—**baldaŭi**); plu akron—**trinku** akvon; homa **skulpto**—**preĝaŭskulto**; —eĉ ĉe puraj rimoj: belegas, relegas, prelegas). Spritaj estas la vortludoj; la ĉamino—l’ aĉa mino; sola vino—sol-avino; kun eĉ unu originala pluso (en 102):

Ĉiela volbo estas nur bovlo renversita!

Al ambaŭ partioj en la disputo pri “la modo post kvazaŭ” mi rekomendas mediti jenan ekzemplon kun *se* (en n-ro 17):—

Nu la kombilo, se ĝi cent vundojn
ne suferis,
sen dent’ ne povus frizi la
buklojn de l’amato.

fino sur paĝo 340

Poul Thorsen :

Prelego en Somera Universitato, Zagreb 1953

La poezio de la eskimoj *

DEVUS eskimo fari tiun ĉi prelegon, sed pro kelkaj kaŭzoj ja ne eblas. Vi tial devas kontentiĝi per ne tute kontentiga transplanto de kelkaj specimenoj el eskima poezio tra la dana lingvo. Mi povas tion fari nur dank' al la fama dana esploristo Knud Rasmussen, kiu mortis 1933.

Li estis mem parte eskimo, naskiĝis en Grenlando kaj plene majstris la eskiman lingvon kaj la eskimajn sportojn. Lia merito estas ne nur multaj, longegaj vojaĝoj en Grenlando, Kanado kaj Alasko, kie li trapasis slede distancon duone ĉirkaŭ la globo—sed plie lia konstanta kolektado de centoj da legendoj, fabloj kaj kantoj. Poste li redonis ĉion dane, parte ankaŭ angle, kaj ĉar mem poeto lia traduko laŭdire estas same bona kiel la originalo.

Pri sia metodo Knud Rasmussen mem diris: “Mi aŭskultis fablon aŭ kanton seninterrompe de komenco ĝis fino, se eble plurfoje. Poste mi skribis la verkon en eskima lingvo, dum la kantanto ripetis frazon post frazo. Nur hejme mi tradukis la kolektitan materialon”.

En sia kolekto, *Kantoj de l' neĝa kabano*, Knud Rasmussen humile konfesas, kiom malfacile estis transplanti eskimajn kantojn danen. Ĉiu poemo havas specialan 3–5 tonan melodion, kies intervaloj ofte ne ekzistas en nia tonsistemo. La teksto ne havas ordinaran metrikon nek rimojn, kvankam foje ekzistas aliteracio. La ĉefaĵo estas *la ritmo*, kiu estas tiom komplika, ke neeskimaj oreloj nur malfacilege povas distingi ĝin. Krome la eskima lingvo havas

longegajn kunmetaĵojn kaj multajn paralelojn por ni superflujajn, sed subtenantaj la memorkapablon de senalfabetuloj.

Tial al simpla skribita traduko mankas preskaŭ ĉio, kio vivantigis la kantojn en ilia malproksima hejmloko. Ne eblas ja redoni la festan tamtamon de tamburoj — la sola eskima muzikilo — la ritman akompanon de la ĉeestantoj per sonoj mildaj, flustraj aŭ kreskantaj ĝis ekstazo en scenoj, kiuj proksimas al la dramo.

Por ni do malestas tiu distro de eskima kadro, kiu devus ĉirkaŭi la poemojn. Sed kio estas manko, montriĝas avantaĝo, ĉar en la internacia lingvo ja decas nur kompari per valoroj de tiu lingvo mem.

Ĉar nur laŭforme—ne enhance—la eskima poezio ŝajnas al ni fremda. La poemoj povas efiki tute intimaj, se ni senvestigas ilin de la origina vestaĵo kaj prezentas ilin en Esperanto. La jena povus same bone esti produkto de lirikema Esp.-poeto. Miro pro naturo ja estas komunaĵo por ĉiuj popoloj.

Ho, somera varmo, kiu ondas
Neniu bloveto, sur tero !
neniu nuboj—
kaj inter la montoj
sin paŝtas la cervoj
la karaj boacoj
en blua malproksimo.
Ho, ĝi min tiras,
ho, feliĉigas ;
preskaŭ kun ploro
tuŝas mi teron.

* La prelegon akompanis 4 specimenoj de originalaj kantoj per dratregistriilo.

Pli malfacile kompreneblaj estas kantoj rilate manĝoĝojn aŭ panegiron al la kuirpoto kun rosmara viando. Tiaj kantoj havas antaŭkondiĉojn: la malvarmo, mallumo kaj malsato—la tuta danĝera vivo de kaptistoj najbara al Norda Poluso.

Por kompreni kelkajn kantojn necesas scii, ke eskimoj neofte kantas kantojn de aliaj. Ĉiu prefere havas aŭ faras proprajn kantojn, viro, ino, eĉ infano. Ekzemple en *Eta Kanto* oni konstatas hontemon, ĉar ĝi ne estas propra ideo aŭ havo—modesto rara inter aŭtoroj!

Mi kantas etan kanton,
etan, uzitan kanton de alia;
sed mi kantas ĝin kiel la propran,
mian propran, karan kanton.
Kaj tiel mi ludas
kun la uzita kanteto,
ke ĝi renoviĝas.

Upernivik, Okc. Grenlando;
trad. Gerda Thorstain.

Esti poeto sub la nordlumoj estas komplika afero. Li devas samtempe funkcii kiel dancanto, tamburisto, kantanto kaj ĥorinstrukcianto—ĉio sen helpo de muziknotoj aŭ eblo ion ajn noti. Sub tiaj cirkonstancoj poezio estas afero de plej peniga rememorado.

Tial poeto kutime serĉas solecon sur roko aŭ en vasta ebena. Vagante tien-reen li murmure masonas ideojn en frazojn, ĝis fine li scias parkere. Nur kiam la kanto havas firmajn radikojn en la cerbo, la poeto—laca, malsata sed feliĉa—revenas al sia publiko.

En la poemo *Mia spiro* la poeto devige izoliĝis. Sole li kuŝis malsana longtempe. Sed li pasigis la tempon farante poemon—

Mia spiro

*Tia mi nomas tiun ĉi kanton, ĉar
al mi same necesas ĝin kanti, kiel spiro.*

Mi volas kanti kanton,
kanton, kiu estas forta.

Unaija—unaija.

Malsana mi kuŝas ekde aŭtuno,
senhelpa, kvazaŭ mi estus
mia propra infano.

Triste mi deziras mian virinon
for al alia kabano,
al viro,
kiu estos ŝia rifuĝo,
sekura kaj firma kiel vintra glacio.
Unaija—unaija.

Triste mi deziras mian virinon
for al pli bona protektanto;
nun, kiam mankas la forto
levi min mem de l' kuŝejo.
Unaija—unaija.

Ĉu vi konas vin mem?
Tre malmulte vi scias pri vi mem.
Senforta mi kuŝas sur mia breto
nur la rememoroj fortas!
Unaija—unaija.

Ĉasbestoj! Granda ĉasaĵo!
Fuĝantan kaptaĵon mi ofte pelkuris!
Lasu min retravivadi kaj ree memori,
ke mi forgesu mian malforton.
Unaija—unaija.

Me memoros la grandan blankulon,
la marurson,
kiu venis kun alte levita postaĵo
kaj nazo en la neĝo!
Ĝi arogis al si,
ke sole ĝi estas virbesto,
kaj venis kurege al mi.
Unaija—unaija.

Ĝi min renversis
fojon post fojo,
tiam senspire foriris
por kuŝe ripozi
malantaŭ glaciroko ronda.

Senzorga ĝi estis, nesciante
ke mi estos ĝia finsorto.
Ĝi aroĝis al si,
ke sole ĝi estas virbesto,
kaj ne imagis,
ke ankaŭ mi estas virulo !
Unaija—unaija.

Neniam mi forgesos la grandan
la fjord-fokon, lardulon
kiun mi mortigis sur mar-glacio,
frumatene, longe antaŭ tagiĝo.
La kamaradoj hejme
ankoraŭ kuŝis kvazaŭ mortaj,
elĉerpitaj pro miskapto kaj malsato,
kaj dormis,
dum mi kuregis surglacie
por esplori la spir-truojn.
Kaj jen maljuna, ruza virfoko
tuj flaris la homon.
Sed antaŭ ol ĝi ekspiris
mia harpun-pinto
penetris mortige ĝian nukon.

Tia estis mi iam.
Nun mi kuŝas senforta sur dormbenko
eĉ ne kapabla havigi lardon
por lampo de mia edzino.
La tempo, la tempo ne volas pasi
dum tagiĝo sekvas tagiĝon,
kaj printempo proksimiĝas la
Unaija—unaija. loĝlokon.

Kiom longe mi kuŝu ĉi tie ?
Kiom longe ?
Kiom longe ŝi iru almozi
lardon por sia lampo,
cervohaŭton por vestoj,
viandon por manĝo ?
Senhelpa mizerulo—sendefenda
Unaija—unaija. virino.

Ĉu vi konas vin mem ?
Tre malmulte vi scias pri vi mem !
Dum tagiĝo sekvas tagiĝon,
kaj printempo proksimiĝas la
loĝlokon.

Verkis Orpingalik, Netsilik-popolo.

Tuj sekvas alia ekzemplo kun
aludoj pri la kantfaro mem :

Gojo de l' kanto

Ĉarma estas la ago
fari kantojn !
Sed tro, tro ofte
ili fiaskas.

Ĉarma estas la sorto
atingi dezirojn !
Sed tro, tro ofte
ili forvelkas.

Ĉarma estas la ago
ĉasi cervaron !
Sed tro, tro malofte
oni distingas sin
kiel flaman fajron
sur la ebena.

*Verkis Piuvkaq, Utkuhikja-popolo,
Granda Fiŝrivero.*

Maljuna eskimo, *Kilime*,
Angmagsalik, Orienta Grenlando,
rakontis proze al Knud Rasmussen
pri la fenomeno de inspiro :

“Ĉiuj kantoj naskiĝas en la dezerto.
Foje ili venas kiel ploro profunde el
doloroj de la koro, foje ili saltas el
homa ĝojo pro la vivo aŭ pro ekvido
de rava loko”.

Kaj *Orpingalik*, Netsilik-popolo,
aldonis :

“Kanto estas pensoj, kiuj venas
kun la spiro, kiam granda forto
movigas homon, kaj ne plu sufiĉas
ordinara parolo.

“Kanto movigas homon kiel
marfluo movigas glacifloson. Fluanta
forto pelas liajn pensojn, tiel ke li
sentas ĝojon, angoron, malĝojon.
Pensoj povas inundi lin kiel rivero
inundas teron, igi lin senspira kaj
rapidigi lian korbato. Io kiel milda
vetero varmigas lin. Kaj povas
okazi, ke unu, kiu sentis sin mal-
granda, sentas sin ankoraŭ pli mal-
granda. Ni ektimas la vortojn, sed

ankaŭ okazas, ke la vortoj, kiujn ni bezonas, venas subite per si mem.

“Kiam la vortoj, kiujn ni bezonas, tiel formiĝas per si mem, tiam ni ekhavas novan kanton”.

Karakterizaĵo de eskimaj epopeoj estas, ke la heroo ĉiam estas ne nur bona batalanto, sed nevenkebla improvizanto de kantoj. Sian famon li akiris dum longaj vojaĝoj aŭ per unika lerto ĉasante, kiel en la poemeto

Nordcervoj

Rampe mi venis senbrue trans marĉo kun arko kaj sago en buŝo.

La marĉo estis larĝa kaj la akvo glacita, kaj nenie videblis kaŝejo.

Malrapide mi serpentis trae malseka, sed nevidebla, rampe ĝis paf-oportuno.

Manĝis la cervoj, ŝiris senzorge la
sukan muskon,
ĝis mia sago treme atingis
bruston de vira bestego.
Tiam paniko frapis nesciajn
ebenanojn.

Disiĝis la aro,
kurege malaperis
malantaŭ ŝirmaj montoj.

*Verkis Aua, Iglulik-popolo,
Lyon Inlet.*

Malfeliĉo estas inspiro de la sekva kanto, kiun faris edzino, perdinta sian edzon. Ĉio estas tristo. Nur ŝi havas amuleton, peceton da ligno aŭ osto, kudritan al la felo, kiu kovras ŝin kaj ŝian mizeron sur la dormbenko.

Kanto de l' vidvino

Kial havas miaj kunhomoj
neniun kompaton al mi?

Peza estos mia dormo,
ĉar mortiginto de *Maŭla*
ne montris kompaton.

Ijaja—ijaja.

Ĉu ŝajnas tre strange,
ke doloris,

kaj ke mi kompatis
mian ununuran,

kiam mi ekvidis lin
ĵetitan sur la teron

kun klinita kapo?

Ĝismortaj malamikoj murdis lin,
kaj vermoj malebligas por li
revenon por ĉiam.

Ijaja—ijaja.

Tamen ne sole li
min forlasis,

ĉar ankaŭ mia fileto,

kiun mi amis,

iris al lando de l' ombroj.

Ijaja—ijaja.

Nun mi estas kiel besto

falinta en kaptilon

en propra domo.

Ijaja—ijaja.

Longa estos mia vojo surtere.

Estas kvazaŭ mi neniam sukcesos

malproksimigi la proprajn

piedsignojn.

* * *

povra amuleto

restas mia sola havaĵo,

dum nordlumoj dancas fajroludon

trans ĉielo.

*Verkis Qernertoq, Moskbova popolo,
Bathurst Insel.*

Post tiu ĉi malgajeco ni iru al pli petola afero. Estas la kantbataloj, dueloj, kiuj damaĝe apenaŭ okazas en la nuntempo. Ili malaperis, ĉefe pro interpuŝoj kun la pastroj, kiuj opiniis la kantduelojn tro senrespektaj, eĉ blasfemaj, ĉar ili havis radikojn en la malpermesitaj idolaj tradicioj, sekve ne povas akordiĝi kun la kristanismo.

Tamen en la tempo de Knud Rasmussen kantbataloj ankoraŭ

okazis, almenaŭ *kiel referaĵoj*, kiam okazis kantfesto. Oni invitis al festdomo eble 100 homojn aŭ en neĝa kabano ĝis 60 personoj, kiuj longan tempon antaŭe preparis sin, kiel tiu ĉi junulo *Igpakuhak* el Viktoria lando, Kanado, kiu kantas pri

Sopiro al Kantbatalo

Oni diras, ke estas ĝuo
al homaj oreloj
bone aŭskulti,
kiam granda kantanto levassian voĉon
balancante sian korpon en danco.

Kaj vidu :

Kiam la granda kantanto laŭtigas
sian voĉon

Dancante laŭ sonoj de l' tamburo,
tiam flirtas ĉiuj blankaj ermenfeloj
kiuj ornamas lian pelton.

Tintas, sursuras en miaj oreloj !

Kaj tion kaŭzas
la homoj malsupre
ĉe la eta trut-rivero.

Mi sopiras al festdomo,
al la eta festdomo de "La Ostulo",
li, kiun mi kutimas
defii por kantbatalo.

Kaj tamen mi ne forgesas,
kiel kore oni kompatas
tiun, kiu perdas la batalon,
soligita per mok-kantoj
kiam nia duelo baldaŭ finiĝos.

Miaj oreloj, miaj oreloj !
Tintas, susuras en miaj oreloj !
Mi sopiras al kantbatalo en festdomo.
Kaj tion kaŭzas la homoj malsupre
ĉe la eta trut-rivero.

Knud Rasmussen rakontis, kiel amasiĝis la gastoj por kantfesteno en atmosfero tre kora kaj—varma. Iom post iom oni forĵetis ĉiujn vestojn, kaj pri laodoro decas silento.

La mastro, kun nuda brusto, bonvenigis dirante, ke bedaŭrinde la domo estas pli malgranda ol la

gastamo. Li esperas, ke la festeno daŭros ĝis la nova tago. Sed antaŭ ol kanti, certe pli bone estus manĝi.

La festmanĝaĵo estis simpla laŭ konsisto kaj servado, sed tiom pli ampleksa kvante, 300-kilogramaro smaro kun haŭto kaj haroj. La bestaĉo estis tirata per multaj ŝnuroj rekte en la domon ĝis la piedoj de la gastoj dum laŭta kriado. Infanoj, kiuj fastis dum la tuta tago, gapiis pro tiom da manĝeblaĵo.

Virinoj tute konfuzaj pro la granda abundo ekpartigas la bestegon per tranĉilegoj. Freŝa grasaĵo kaj viandopasas de mano al mano kaj malaperas en sennombrajn buŝojn. Kun la satigo kreskas la gajo. La abundo bonfartigas kaj intimigas ĉiujn. Tie denove pruvigas, ke nur post kontentigo de materiaj bezonoj oni pretas por spiritaĵoj—en tiu ĉi okazo koncerto okhora.

La mastro eksaltas kaj komencas trakti la grandan sorĉistan tamburon Bonfarte, tute prete li okulumas al la gastoj. Subite li ekdancas, sed sur la malgrandega spaco la danco limigas sin al tordoj de la korpo aŭ vibrado de la ventro.

Li komencas kanti kanton se vortoj. Ĝi nur konsistas el konstantaj aj-aj-aj-aj ! Avaija—avaija ! Tio sekvas ĥoro de ĉiuj ĉeestantoj, tute akvofalo de akompanaj krioj kaj gajaj grimacoj.

Sed tio nur estas kvazaŭ uverturo por agordi la voĉojn kaj stimuli ĥoron. Nun aperas maljunulo, kiu deklaras, ke li volas imiti kantbatalon, tia, kia ĝi okazis en lia junaĝo.

Kiam viroj tiutempe malamikiĝis ili ofte decidis fari kantduelon anstataŭ klopodi mortigi unu la alian.

Do, ili sin preparis dum semajno per atako, defendo kaj kontraŭatako kaj fine invitis amikojn, familion kaj

kontraŭulojn por juĝi. Ĉiuj aperis en plej belaj festovestaĵoj, kaj la duelantoj sin trovis meze en la rondo. Kiu kapablis tiom moki kaj inciti la kontraŭulon, ke rido kaj aplaŭdo estis tute sur lia flanko, kompreneble venkis.

Tamen vortoj ne ĉiam estis la sola armilo. La tamburantaj kantantoj dancis ĉirkaŭ si tiom proksimege, ke ofte kunfrapiĝis la kapoj kaŭzante ŝvelojn, fermitajn okulojn kaj svenemon. Sed la reguloj postulis, ke oni akceptu ĉiun mokon kaj baton sen ĝemo, eĉ sen kolero, kun multe da ridoj, ĉar venontvespere oni mem havos la vicon redoni mokon, incitojn kaj novajn kapofrapojn !

Sed plej mirinde estis, ke kiam finiĝis la kantbatalo, kaj oni elĉerpis sin ĝis lasta ebla insulto, tiam oni forgesis la malamikecon, iĝis bonaj amikoj kaj ofte eĉ donis valorajn donacojn al sia kontraŭulo.

Jen parto de tia kantdialogo. Duelas la eskimoj *Kangitsûaq* kaj *Kuitse*, el Kabo Dan.

Mokkanto pri interŝanĝo de edzinoj
(mallongigo)

Kangitsûaq :

Diri mi volas, kia vi estas, mia
kontraŭulo :

Ĉu ne estas tiel, ke neniuj viroj
emas interŝanĝi edzinon kun vi ?
Sed bonaj viroj ariĝas ĉirkaŭ mi
tiucele.

Mi estas viro, kiun amas virinoj,
kaj mi povas diri,
ke mi ne tute ignoras ilin.
Pri vi mi aŭdis, ke vi preskaŭ
mortigis amikon, kiu proponis
virin-interŝanĝon al vi.
Tia li estas, mia ridinda malamiko
en kantbatalo !

Foje mi estis sur mara glacio
glitveturile for de loĝ-loko.
Urson mi vidis, eĉ kun ideto,

stumble ĝi pasis en ŝia spuro.
Ambaŭ mi pelis kun mia hundaro.

Boje mi baris ilian vojon,
kaj mi elektis zorge la grandan.
Tian ĉasaĵon neniam haltigus
mia timema malamiko !

Lia mizera hundaro
ne taŭgas por ĉaso.

Ili neniam ekvidos eĉ urson,
magraj, mizeraĵoj, malgrandaj rampuloj
kun feloj nur taŭgaj forĵeti.

Jes, tia mi faris mian moko-kanton.
Lasu ĝin resti memoro ĉe homoj,
kiuj ŝatas ion por distro.

Kuitse :

Vidu lin, kia li estas,
mia kantanta malamiko !

Fanfarone li buŝumas
same kiel ĉiuj el lia loĝ-loko.

Por li ŝajnas ĉio facila,
tro bona memoro !

Sed mi singardas pri miaj vortoj
kaj eĉ ne kuraĝas kanti pri ĉio,
kion *mi* memoras.

Kelkaj sendube ja konis
miajn kuzinojn kaj kuzojn.

Ĉiuj foriris vojaĝe
kaj ja neniam revenis.

Ilin, de mi amataj,
li fimokis per kanto.

Ŝprucfekulo ! Dikventrulo !

Kion mi diru pri vi,
kiu estas tiom aminda kaj milda ?
Pri vi eĉ ne ekzistas io dirinda !
Kaj tamen. Afereto trafis mian orelon.

Estis vi, kiu planis mortigi
la viron kun la lamaj kruroj.

Kiam mi aŭdis tion,
mi miregis, pensante,
ĉu tia kadavro-manĝanto,
ventrograsa kun rondaj koksoj,
posedas forton por mortigi ?

Ho jes, kriplulon vi elektis,
ĉar mallerta maldiligentulo vi estas,
nur taŭga por ronke dormi
inter naŭze varmaj feloj !

Tiel alternas la kontribuoj en la kantbatalo laŭ la referaĵo de maljunuloj. Sed por reveni al la kantfesteno priskribita de Knud Rasmussen :

Subite viro etendas sin sur la planko. Li kantas kuŝante kaj movas la kapon takte supren-malsupren. Li estas baleno. La eta planko-spaco estas vasta maro. Oni aŭdas ĝin plaŭdi inter liaj piedoj, ĉar la granda baleno ensuĉas glacie malvarman akvon el barelo kaj blovas ĝin super la plej proksimaj nudaj virinoj. Kaskadoj de krioj, nova kantado kaj tamburado salutas la balenon, kiu blovas akvon denove kaj denove.

Kaj tiel daŭras la festeno noktojn kaj tagojn ĝis plena elĉerpiĝo. Sed kiel fini pli digne tiun-ĉi traktaĵon ol per la diroj de maljuna eskima virino, kiun trovis Knud Rasmussen sur izola insuleto en la Beringa maro. Ŝi rakontis jene pri la estinteco kaj ties moroj :

“Ĉiam la aŭtunaj festoj komenciĝis per novaj kantoj, kiujn komponis la viroj. Eluzitaj kantoj ne havis forton. Sed en la tagoj, kiam la viroj kunmetis la vortojn por la novaj kantoj, ĉiuj lampoj staris mallumaj. Ĉie regis silento por ne ĝeni aŭ distri. Tiun silenton ni nomis *Qartsiluni*, kio signifas, ke oni atendas ion, kio nur pene trovas sian vojon.

“Niaj praavoj kredis, ke la kantoj naskiĝas en tiu granda silento. Tiam ili ekestas en la animo de l' homoj kaj leviĝas kiel veziketoj el profundo de l' maro. Ili serĉas la aeron por diskreveti”.

Eble oni konsentas, ke tiu eskima esprimo *Kvartsiluni*, la momentoj de poezia inspiro, estas inda por ekzisto ankaŭ en nia internacia lingvo Esperanto.

Noto. Kun penetro de la civilizo norden malaperis la uzo de originalaj eskimaj poemoj personaj, magiaj, mokaj k.t.p. En Okcidenta Grenlando preskaŭ ĉio estis forgesita, kiam la danoj *William Thalbitzer* kaj *Knud Rasmussen* sojle de tiu ĉi jarcento komencis sian penigan registran laboron. Sed en Orienta Grenlando kaj Nordameriko multe pli longe floris la popola poezio. Tial nun kelkaj unikaj kolektoj “travintras” en arkivoj, libroforme kaj (malfeliĉe tro povre) sur diskoj, ĝis en la eskima popolo ekestos (neeviteble !) nova inklino al la pratrezoroj.

P.Th.

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝo

Nardon. Al Ges. Robert Nardon (54 bis, rue de Lancry, Paris-X) filo David, la 29an de septembro 1953.

Al ili ni esprimas sinceran gratulon.

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj, al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.


Cioffi-Visco, Prof. D-ro Ciro, instruisto kaj propagandisto de Esperanto depost 1930, mortis la 28an de aŭgusto 1953 en Vico Equeuse (Napoli), Italujo.

Crowley, D-ro R. H., Tewin, Anglujo, Dumviva Membro de UEA, mortis 84-jara, la 25an de septembro 1953 ; Kuracdirektoro ĉe la Eduka Aŭtoritato brita, fervora Esperantisto kaj kasisto de la Kvakera Esperanto-Societo dum multaj jaroj.

Haave, S-ro Carl, el Brumundal, Norvegujo, mortis la 24an de septembro 1953, je aĝo 60. Li estis dum longa tempo fidela samideano.

Schacht, D-ro Peter, Wellington, Novzelando, Dumviva Membro de UEA, mortis en New York la 20an de septembro 1953. Vigla samideano kaj unu el la gvidantoj de Esperanto-klubo de Wellington.

Sinclair, S-ro Alexander J., Te Awamutu, Novzelando, mortis la 1an de julio 1953, 66-jara. Aktiva Esperantisto kaj propagandisto en Rotariaj rondoj.



Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Lundo	21.35–21.40	Wien. 513m., 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	22.15–22.30	Hilversum. 298m. P. (nur 26–X, 23–XI). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Mardo	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m. 75.28m., P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	15.00–15.15	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan mardon).
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m. 75.28m., P. D-ro Baur.
Merkredo	15.45–16.00	Graz. 417.2m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	18.00–18.20	Roma. 25.21m., 31.35m., 49.92m. P. S-ro Minnaja. Radio Roma, Via Vittorio Veneto 56, Roma, Italujo.
	19.30–20.00	Madrid. 225m., 42.33m. P. Radio S.E.U., Sección Esperanto, Diego de León 49, Madrid, Hispanujo.
	21.45–22.15	Valencia. 43m. P. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m., 188m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	07.40–07.45	Lille. 218m. I. Prof. Labit, 1 rue St-Martin, Lille (Nord), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	23.05–23.30	Zagreb. 264.7m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	18.00–18.20	Roma. Kiel merkrede. P. D-ro Musella.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro, (DF), Brazilo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

RADIO ROMA

Programo de Novembro 1953

Merk. 4an.	Novaĵoj el Italujo.
Ven. 6an.	Italaj belartaj urboj : Parma.
Merk. 11an.	Italaj artistoj : Enrico Caruso.
Ven. 13an.	La libroj kaj Esperanto.
Merk. 18an.	Speleologio kaj subtera turismo.
Ven. 20an.	“La flegisto de paĉjo” el la libro “Koro” de Edmondo De Amicis.
Merk. 25an.	La 1a eklogo de Virgiljo (Melibeo kaj Titiro).
Ven. 27an.	Respondoj al la geaŭskultantoj.

La Belarta Konkurso 1953

Raporto pri la branĉo "Originala Prozo"

LA ĉijara novelkonkurso donis tre ĝojigan rezulton kaj surprizon. Ne nur la nombro de la konkursaĵoj altiĝis tre signife, sed ĉefe alia kvalito. Pri tio atestas la alta nombro de tiuj konkursaĵoj—sume 17—kiuj el la alvenintaj 23 atingis pli ol 50 poentojn, t.e. la mezan nombron de la eblaj poentoj. Unu el la verkoj ne respondis al la formaj postuloj kaj ne estis juĝata.

Ĉiu unuopa verko premiita atestas pri sukcese plenumitaj artaj klopodoj. La juĝantaro premiis kiel plej elstaran la konkursaĵon, SENHEJMULO. Tiu ĉi verko brilas per sia perfekta kompozicio, konciza certeco, seriozo. Ĝia aŭtoro sekvas la vojon signitan en la novelverkado de E. A. Poe, Maupassant kaj ĉefe tiun de H. G. Wells kaj prezentas artaĵon, kies resono estas longa kaj profunda. La aŭtoro estas: R. J. French (Anglujo).

La duan lokon atingis la konkursaĵo LA LIMO (aŭtoro: Jolanthe Leser, Vieno). Tiu ĉi novelo okupas sin pri la brule aktuala problemo de la nuno: milito dum la postmilito. La tono de la rakonto estas emfaze varma, tamen imuna de falsa patoso. Ĝia agordo estas sugesta. Pri kompozicio oni apenaŭ povas paroli, sed la verko sekvas la alian vojon de la novelo, tiun de Ĉeĥov.

Du verkoj de sama verkistino Marjorie Boulton (Anglujo) atingis la trian kaj kvaran lokojn. LA PORTRITO DE LA POETO ricevis la trian premion. Enhave la novelo estas tre delikata lirika agordo, kies problemo, se oni entute povas uzi la vorton problemo en kontakto al la verketo, estas la eterna mistero de

la vivo kaj tempo. Molaj koloroj kunfluantaj, sed agordon formantaj, memorigas nin pri denove alia vojo de la novelarto, pri tiu de Katherine Mansfield. La sekva premio estis aljuĝata al la verko: KAPTILO DE DIO de la sama aŭtorino. Tiu ĉi novelo estas fantazi plena, riĉenhava vivfilozofio, kies simboloj estas facile kompreneblaj, altvaloraj kaj senpene perceptotaj.

Post la verkoj de nordeŭropanoj gravaj verkoj de sudeŭropanoj atingis altetakson de la juĝantaro. La kvina loko apartenas al Stepan Urban (Praha) pro la verko LA SORĈISTO. Tiu ĉi novelo estas unu el la plej gravaj el la vidpunkto de serĉado de stilnovigo, sondado de subkonsciaĵoj kaj distingiĝo de la ĉiutagaĵoj. La sama verkisto prezentas sian talenton ankaŭ per alia verko: FERIOJ KUN LA MUZO (gajninta la sepan lokon). Tiu ĉi lasta novelo prezentas la aŭtoron kiel sugeste viglan, figurvivigan talenton.

Inter la menciitaj du noveloj la sesan lokon atingis Takaĉ Zeljko (Zagreb) per sia konkursaĵo: MENSOG' NIA ĈIUTAGA. La aŭtoro verkas kun konsiderinde viva rakontemo. Lia lingvaĵo estas klara kaj bela. Kritike li reagis pri la konvenciaj doktrinoj kaj reguloj kaj pri tio li verkadas plej volonte kaj konvinke.

Estas nepre menciinde, ke ankaŭ inter la malpli alte poentitaj verkoj estis multaj atentindaj kaj valoraj. Entute tiu ĉi branĉo kaŭzis verajn plezurojn al la juĝantoj, precipe pro la en ĝi latentaj promesoj.

F. Szilágyi.

Raporto pri la Drama Branĉo

Sep verkoj konkursis ĉijare, el kiuj tri ricevis premiojn; entute kvar superis la mezan nombron de la atingeblaj poentoj kaj aldonante ankoraŭ unu, kies poentoj estis en la tuja proksimo de la meza limo oni povas konsideri la rezulton de tiu ĉi branĉo kiel bonan.

La du unuaj premioj dividiĝis inter du aŭtoroj, kies verkoj atingis la saman poentnombron, William Auld (Glasgovo) kaj Gerald Jervis (Anglujo) pro la verkoj: KVAZAŬ BIRDOJ KONSTRUAS kaj LA SINJORINO, KIU KREDIS. La unua drameto

prezentas lerte elcerbumitan intrigon kaj ĝia perfekte riĉa lingvo, ĝiaj klaraj, liberaj kvinakcentaj rimoj vestas tre elegante la temon. Aromo, suko, sprito kaj karakteriza forto, psikologia senso distingas la verkon. La alia drameto estas amuze kaj lerte konstruita farso, kun bona kono de la sceneja tekniko kaj kun tiu de la natura, flua lingvo.

La tria premio apartenas al la konkursaĵo REAĈETO DE PRINCO. Ĝia aŭtoro Marjorie Boulton (Anglujo) vive kaj kredige prezentas la ekzotikan temon, tamen ne tute sen lingvaj mankoj.

F. Szilágyi.

Internacia Konkurso 1953

Stato je la 30a de septembro

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Argentino ..	500	900	180.0
2. Italujo ..	2400	2935	122.3
3. Maroko ..	600	700	116.7
4. Aŭstralio ..	900	1010	112.2
5. Germanujo ..	3200	3585	112.0
6. Sudafriko ..	300	330	110.0
7. Aŭstrujo ..	800	860	107.5
8. Francujo ..	5200	5554	106.8
9. Svedujo ..	5500	5876	106.8
10. Svislando ..	1450	1505	103.8
11. Nederlando ..	4600	4654	101.2
12. Norvegujo ..	2100	2134	101.6
13. Usono ..	2300	2304	100.2
14. Belgujo ..	2200	2177	98.9
15. Danlando ..	2500	2455	98.2
16. Japanujo ..	900	870	96.6
17. Urugvajo ..	250	240	96.0
18. Britujo ..	10000	9424	94.2
19. Hispanujo ..	1500	1395	93.0
20. Finnlando ..	2200	2020	91.8
21. Kanado ..	300	250	83.3
22. Kubo ..	250	205	82.0
23. Islando ..	450	360	80.0
24. Portugalujo ..	600	470	78.3
25. Irlando ..	250	185	74.0
26. Novzelando ..	900	635	70.5
27. Brazilo ..	6500	4220	64.9
28. Jugoslavujo ..	1500	820	54.7

Omar Kajam (*daŭrigo de paĝo 330*).

Oni atentu unu preseraron en la 56-a robaio: *je ĉiu somerveno* (ne *somerfino*).

Tiu ĉi libro estas ne nur bela frando por la poezi-adepto, sed ĝi ankaŭ estas bonega lernolibro por la versfaranto (tre utilos la antaŭparolo). Ĉar nun, kiam niaj poetikaj rimedoj estas tiom evoluintaj, necesas averti—ne la originalajn poetojn, certe, sed ja la tradukantojn — per la vortoj de Petöfi:—

Facilanime sin neniu
dediĉu al surkorda lud',
tre gravan taskon sur sin prenas,
kiu nun tuŝas al liut'.

R. Rossetti.

Arboj de la Arbaro kaj Kampo de Frank Booth



Trafe ilustrita libreto
pri arboj de Norda
Eŭropo.

40 paĝoj - - 1 ŝil.

Mendu ĉe U.E.A.

Erika Linz :

La dazipo de Brazilo

KIAM ni estis ĉi tie la unuan jaron ni iam iris sur vojeto laŭlonge de deklivo. Subite Harro faletis (tiam li estis 12-jara). Lia piedo trafis en grandan tute freŝan truon, kiun plenigis malfirma tero. Nia laboristo, negro Jozefo, kiu iris kun ni, sin klinis kaj atente esploris la freŝe elfositan teron. Li montris al signo de malgranda bestopiedo kaj flustris: "Hodiaŭ!" Kaj lia larĝa vizaĝo radiis je ĝojo.

"Kio estas?" Harro demandis ankaŭ flustre, sed li estis tiom ekscitita ke lia voĉo tamen iom laŭtis. Jozefo faris ĉagrenitan geston, ke ni nun ne parolu, nek pluiru. Sen sono, nur per la lipoj, li formis la vorton: *Tatu*. Tio estas la portugala aŭ pli ĝuste la indiana vorto por dazipo.*

Li levis bastonegon de sur la tero farante eĉ ne brueton kaj antaŭeniris paŝon post paŝo kiel kato, kvankam li estis granda kaj larĝa kiel bovo. Post kelkaj paŝoj li sin turnis al ni kaj montris tute senbrue al la alta herbo apud la vojo, kaj poste restis senmova. Harro ne moviĝis sed lia tuta korpo estis atentega. Vere, la herbo tie ŝanceliĝis laŭ stranga maniero. Tion ne povis kaŭzi la vento. Jozefo observis tiujn movojn tre streĉe. Li malfermegis la okulojn tiom ke iliaj blankoj aspektis kiel blankaj diskoj en lia nigra vizaĝo. Subite li levis la bastonon kaj saltis batante per ĝi en la herbon. Tuj poste li levis triumfe la ĉasitan beston alten.

Ĝi estis stranga besto. Granda kiel dumonata porkido kun nigra, iom pinta nazego. La tuta dorso estis kovrita de malmola kiraso, kiu estis kunmetita el pluraj vicoj da ostaj plataĵoj. Ĝi aspektis kvazaŭ

ĝi surmetis plurajn grizajn zonojn por sin ornami. Ankaŭ la kapon ŝirmis tiaj zonoj. Ĝi surhavis kvazaŭ kaskon. Inter la kapa kaj la dorsaj kiraso elstaris nur la longaj pintaj oreloj. Poste mi ofte rimarkis, ke tiuj oreloj senĉese gardeme moviĝas ĉiufanken aŭskulte. La antaŭaj piedoj ŝajnis preskaŭ kiel manoj, kiel tiuj de talpo, sed multe pli grandaj, kun longaj ungoj por fosado.

Jozefo ridis de ĝojo, montrante siajn blankegajn dentojn. Li batis per la mano sian ventron kaj kriis: "Bongustas, bongustas!"

Mi fritis ĝin kaj ĝi vere estis frandaĵo. Kompreneble Jozefo la ĉasisto ricevis la plej grandan pecon. La kirason ni singarde deprenis kaj ĝi funkcias kiel korbeto. Dum jaroj mi gardas en ĝi miajn kudrilarojn. Tio estis mia unua dazipo.

Poste mi multfoje vidis dazipojn. Ordinare ĝi ŝanceliĝas komike peze, sed en danĝero ĝi povas tamen kuri kiel leporo. Ĉiam ĝi malsatas kaj serĉas insektojn. Kaj kiom scivolema ĝi estas! Ĉiam ĝi venas rigardi kio okazas kaj ĉien enŝovas sian nigran nazegon. Antaŭ nelonge ni konstruis novan deponejon. Kompreneble ankaŭ estis bieneto kun barilo, kiel ĉe ĉiuj niaj konstruaĵoj. Baldaŭ poste mi trovis unu matenon en tri lokoj la murojn subfositaj per larĝaj kanaloj. Certe unu aŭ eĉ pluraj dazipoj envenis dum la nokto por esplori la internon de la nova bieno.

Malgraŭ tiaj okazintaĵoj preskaŭ ĉiuj dazipoj estas utilaj. Ili manĝas milojn da tropikaj formikoj, kiuj estas danĝeraj al ni. Malutila estas nur la "dazipo kun nuda vosto" (*Cabassus unicinctus*). Ĝi ŝtelas la maturan maizon de la kampoj. Kiam

la indiĝenoj trovas ĝiajn postsignojn inter la prirabitaj maizospikoj ili metas tien pafilon kun streĉita kano kaj etendas de la ĉano ŝnuron tiel ke la dazipo mortpafas sin mem. La dazipo havas la kutimon ĉiam uzi la saman vojeton, kiun ĝi antaŭe uzis. Pasintjare nia najbaro tiel kaptis tre grandan dazipon sur nia tereno kaj donacis al ni duonon.

La maljuna Johano — tiu lerta ĉasisto unuokula — rakontis al ni, ke alia speco de dazipo, la “tatu bola” (buleto-dazipo : *tolypentes tricinctus*) sin volvas kiel globo kiam la hundoj ĝin persekutas. Tiamaniere la du kirasoj kovras ĝin ĉiuflanke kaj la hundoj tute ne povas mordi ĝin. Ili rulas la bulaĵon per la piedoj kaj nazegoj ekscitite de la ĉaso kaj provante trovi lokon kie mordi kaj mortigi la beston. Sed ĝuste tian ruladon la dazipo deziras. Kiam ĝi atingas deklivon ĝi ofte ruliĝas malsupren multe pli rapide ol la hundo povas ĝin sekvi, kaj malsupre ĝi ekfosas fulmrapide truon kaj sin savas. Ĉar nek hundo nek homo povas fosi tiel rapide kiel dazipo.

La indiĝenoj havas proverbon : virdazipo neniam havas fratinon kaj dazipino neniam fraton. Ankaŭ tio estas vera. La dazipino naskas plurajn idojn, sed ĉiam ili estas samseksaj, aŭ ĉiuj virdazipoj aŭ ĉiuj dazipinoj !

Specimenon (ŝtopitan) de tiu stranga besto vi verŝajne povos trovi en via urba muzeo ; sed ĝi estas multe pli interesa kiam ĝi ŝanceliĝe iras en la plenluna lumo, ĉiam flarante kaj ĉiam movante siajn longajn orelojn.

* Preskaŭ ĉiujn plantojn kaj bestojn kiujn la portugaloj trovis en Brazilo kaj ĝis tiam ne konis, ili nomis per la vortoj, kiujn al ili donis la indianoj. Simile ĉe lokoj. Tial la multaj tiel strangaj nomoj de brazilaj urboj, riveroj k.t.p.

Eĥoj de la 38a Kongreso

La priskribo de la okazaĵoj en Zagreb enhavis kelkajn malĝustaĵojn pri personoj kaj objektoj. Nome, en la raporto pri la Internacia Somera Universitato enŝteliĝis eraro. Estis dirite, ke ĉeestis samideano W. Auld. Fakte li ne partoprenis la kongreson.

Aliflanke la prijuĝo de la tezo de Sinjoro Auld : “Perspektivoj de la Esperanto-poezio” estas persona opinio de la raportinto. La formo de la raporto supozigas, ke estas la aŭtoro mem, kiu diras tion. Mi resumas la precizan opinion de samideano Auld :

1. S-ro Auld ne opinias, ke la sistema karaktero de la internacia lingvo povas produkti aliajn formojn en la poezia arto. (Aliaj formoj tamen povos veni).

2. S-ro Auld ne opinias ke la nombro de Esperanto-parolantoj iel efikas sur la venadon de talentoj kun krea kapablo. Li opinias cetere, ke jam de minimume 30 jaroj nia movado havas riĉan stokon de talentoj kun krea kapablo kaj plurajn talentojn kun eminenta krea kapablo rimarkinda laŭ la plej altaj kriterioj.

3. S-ro Auld konsentas, ke la instrumento ekzistas; sed li plue opinias, ke ekzistis/as impona aro de Paganini-oj kiuj majstre ludis/as sur ĝi.


Hans Jakob, Raportinto.

Sonimitaj vortoj daŭrigo de paĝo 327

anaso, ni eligas signojn kiuj havas tre abstraktan simbolan valoron kaj kiuj, anstataŭ elvoki la originojn de la lingvo, nur spegulas la nunan staton de la idiomato kiun ni uzas.

Esperantigita de D-ro P. Kempeneers el *Vie et Langage* (N-ro 1, aprilo 1952), kun afabla permeso de la eldonejo, Larousse, Rue Montparnasse, Paris.

Enigma Konkurso N-ro 82



Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 28 rue Stuyvenbergh, Brussel II, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento. Limtempo por Eŭropo estas du monatoj.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkupono internacia.

Solvoj :

N-ro 185: Horizontale: amatorosed-laborikoni- urogalonur - minokanelo-enirototem - titolokoti - okazokopek - poresopira - oratamenod - rabolakejo.

N-ro 186: Horizontale: kamelodetala-oratoroteren-koralorarros-imitognomono-manokrokodil-edifiamtrudo-juliofirelok-okaksilofono-portioceanoj-oniimpetjeci-sekvienergia-tioaortoarom.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 78-a konkurso: S-ro A. H. v. d. Broek (Ned) 143, S-ro E. Pitton (Svis) 135, S-ro H. Westergaard (Dan) 133 p.

Enigmo N-ro 189: Krucvort-enigmo, figuro el 12×12 kvadratetoj, sen nigraj fakoj. En la eksteraj 44 fakoj, komencante maldekstre supre kaj rondirante dekstren, suben ktp., oni legos proverbon el la proverbaro de D-ro Zamenhof. Cetere oni havas:

Horizontale: 2. malgranda insekto-manĝanto - malhumile postulanta 3. prezaro (R) - disrompi terbulojn - knedebila (R) 4. taĉmento da soldatoj - ornami per maldika metaltavolo - trinkaĵo (R) - forlasite (R) 5. markrustulo - parto (R) - orda numeralo 6. troviĝas en Norvegujo - verba finaĵo - parto de la piedo (R) 7. plej supera rezultato - frukto (R) 8. plej elektita - akvomaso (R) - kontraŭo de maŝine 9. armilo - ĥemie plipurigi (R) 10. kontentigita (R) - danĝera rampulo 11. tersurfaco (R) - rekonilo de la

volitivo-grupo (R) elektrodo (R) - ludkarto (R).

Vertikale: 2. epoko - parto de la nerva sistemo, entenata en la spino - grupe 3. ema por fari bonon - nombro - prepozicio 4. persona pronomo - metalo (R) - grupo da soldatoj (R) - malpli larĝa ol ortangulo (R) 5. fluas el vulkanoj - poemo (R) - malofta (R) - saltanta besteto (R) 6. arbo parenca je platano - poemo (R) - impresi flarsento 7. malgranda insekto-manĝanto - parto - portebla loĝejo (R) 8. subite preni (R) - parto de la skeleto (R) - embarasiĝi per io 9. parto de la ĉielo - La Dipatrino (R) 10. speco de ŝranko (R) - tre inklina - kredo je la helpo de iu 11. sufikso - multekosta metalo (R) - nun tre konata metalo (R) - plato el iu ajn metalo.

Enigmo N-ro 190: Reordigu la ĉi-subajn litergrupojn tiel, ke vi trovas kvin esprimojn el la Proverbaro de D-ro Zamenhof.

1. dom - don - dzi - ko - nas - nas - ne - noo - oor - rdo - see.
2. aeĉ - aga - als - asa - ase - asm - ata - est - est - li - mat - ner - nto - rva - sel - sto.
3. aan - ar - are - aro - emd - gul - lfr - nei - nvi - oku - rua.
4. dba - esi - eva - fel - iĉ - kaj - kre - las - lda - nl - ove - sse - ŭfa - vas - zik.
5. ase - edo - efi - ekz - ist - ojn - opo - rk - rmu - ŝet - zok.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 254

2an de oktobro 1953

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de septembro kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1952 :

	1952	1953
Asociaj membroj	7057	7443
Individuaj membroj :		
MJ 907	878	
MA 3759	3854	
MS 515	600	
Patronoj .. 10	6	
DM 264	261	
HM 58	58	
	5513	5657
	12570	13100

DELEGITOJ

Argentino

Córdoba. FD (Botaniko) : D-ino R. Scolnik, Str. Humberto I, No. 2160. Tel.: 87089.

FD (Naturkuracado) : J. Scolnik, Str. Humberto I, No. 2160. Tel : 87089.

Rosario. FD (Filatelo) : vakas.

Aŭstrujo

Salzburg. D : Pastro J. Kaps, Gaisbergstr. 7. Tel : 5007.

FD (Katolikismo) : La D.

Britujo

Bexleyheath. D : vakas.

Coulsdon. FD (Bibliografio Esperanta) : La D.

London. D : A. W. Rowe, 84 Greenfield Road, South Tottenham, London, N.15. Tel : STAmford Hill 0627.

Finnlando

Hyrynsalmi. D : vakas.

Karijoki. D kaj FD : vakas.

Laitila. D : vakas.

Nurmes. D : Erkki Pajunen, Kirjasto, Porokylä.

FD (Bibliotekaj aferoj) : La D.

Suolahti. D : J. Kiviluoto, Aravatalo B 11. FD (Turismo) : La D.

Francujo

Fontainebleau. D : G. Knopf, 19 Rue de l'Arbre-Sec.

Peronne. D : Henri Lesage, Lycée de Peronne.

FD (Kuirarto) : La D.

Hispanujo

Barcelona. VD : J. L. Aldeguer Jaén, Torrente del Vidalet 42—I.

VD : R. Gisbert, Av. Generalísimo Franco 338—2-2. Tel : 25 84 33.

Gijón. FD (Turismo) : A. Menéndez González, str. Trinidad 33—2. Tel : 3597.

Nederlando

Amsterdam. FD (Flegado) : F-ino F. W. Boersma, Camperstraat 17, Amsterdam—O.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Williams, S-ro P., Timaru, Novzelando

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1953.

599. Kelety, S-ro L., Villa Carlos Paz, Argentino

600. Robinson, S-ro M. H., Luton, Anglujo

601. Bellatti, S-ro S., Catsfield, Anglujo

DONACOJ al la Ĝenerala Kaso : O. Bünemann 8ŝ., M. Broise 20ŝ., G. C. Jervis 10ŝ.

DONACOJ al Fondaĵo Montevideo : Ges. O. Bünemann 20ŝ., D-ro H. Wehrheim 8ŝ., H. Wilke 8ŝ., G. R. Aitchison 20ŝ., E. Gasse 20ŝ.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

JARLIBRO. La dua parto de la jarlibro eliris en la komenco de oktobro. Se iu membro ne ricevis ĝin oni sciigu al la Centra Oficejo.

Eraro. En la listo de *Membroj* de la Estraro sur paĝo 69 estas erare presita la nomo D. Kennedy. Bonvolu noti, ke tiu devus esti D-ro P. Kempeneers.

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Ĉar tiujn, kiuj humiliĝis, Li altigos ; kaj kiu mallevas la okulojn, tiu estos savita.

Ijob 22. 29.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage pere de la Sekretario de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, LOONOPZAND, Nederlando.

Ringwood Grammar School (fondita en 1577), West Hill Road, BOURNEMOUTH, Anglujo, bonvenigas knabojn el Britujo kaj aliaj landoj por eduko cele al Ĝenerala Eduka Atesto aŭ por libertempoj.

Kultura Esperanto-Domo akceptos laŭeble de junio ĝis septembro ĉiulandajn Esperantistojn. Eventuale iam ajn ankaŭ karavanojn. Informpeto sendota kun internacia respondkupono al Kultura Esperanto-Domo, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire), Francujo. Represo petata.

Ekspozicio okazos Januaron. Ni bezonas ĉion rilate al Esperanto : gazetojn, bildkartojn, leterojn, k.t.p. Bonvole sendu (prefere aere) al S-ro B. McCracken, 82, Upland Road, Auckland, S.E.2, Nov-Zelando.

Senvortajn desegnaĵojn, humorbildon (ne necese originalajn) serĉas S-ro C. Robinson, 11 Wolseley Road, Hornsey, LONDON, N.8, Anglujo, por fari Internacian Ridadkolekton. Li petas sendi de ĉiuj landoj. Li klarigos sian planon al partoprenantoj.

Vi skribas longe itale : mi same angle, france, hispane, portugale. Ni ambaŭ korektas. La delegito en TORTONA.

Granda Ekspozicio okazos en Decembro. Poŝtkartoj, leteroj, tre helpas nian aferon. Plymouth Esperanto-Grupo, Swarthmore Institute, PLYMOUTH, Anglujo.

Deziras korespondi kun ekstereŭropanoj Rudolf Calek, Ricklefsweg 5, WILHELMSHAVEN, Germanujo.

Mi deziras korespondi tutmonde per leteroj kaj poŝtkartoj ; certe respondos. S-ro Olafur B. Steinsen, Hallveigarstig 4, REYKJAVIK, Islando.

Tasmaniaj gelernantoj, 12 ĝis 16-jaraj, invitas korespondantojn de la tuta mondo. Helpu nin propagandi en ĉi tiu fora lando. S-ro Walter Gerard, Middle Road, DEVONPORT, Tasmania, Aŭstralio.

Por ekspozicio ni petas pri alsendo de gazetoj, gvidfolioj, poŝtkartoj, k.t.p. Rekompence ni sendos gvidfolion de Nürnberg. Esperanto-grupo, Mögeldorfer Hauptstr. 2, NÜRNBERG, Germanujo.

Deziras korespondi kun eŭropanoj S-ro Soliva. Adreso : I-th floor, no. 147 Sin-Hua strato, DAIREN, Ĉinujo.

Antaŭ Haarlem

SKOTLANDO VOKAS VIN !

**INTERNACIA
FERIA SEMAJNO**

Julio 24a ĝis 30a, 1954

en

**Newbattle Abbey Kolegio,
proksime al Edinburgh**

Modernaj komfortoj - Bonaj manĝaĵoj
Allogaj ekskursoj kaj aliaj distraĵoj
Modera kosto - Nur 60 lokoj

Skribu tuj por detaloj al :

**La Sekretario,
Edinburgh Esperanto Society,
20 Glendevon Road, Edinburgh 12,
Skotlando**

LA JUNAJ DETEKTIVOJ de J. H. Sullivan

kun ilustraĵoj de Brenda Goodwin

“Ĉi tiu libreto estas verkita precipe por tiuj geknaboj kiuj lernas Esperanton en lernejoj, kvankam ĝi servos egale por aliaj, kiuj aliloke lernas la lingvon.”

Prezo 2 ŝilingoj, aŭfranko 2p. (aŭ 6 rpk.)

Eldonita de The Esperanto Publishing Co. Ltd.

Mendu ĉe enlanda libroservo aŭ ĉe U.E.A.



MAJSTROVERKO DE LA MONDLITERATURO

IBSEN: PEER GYNT

El la norvega tradukis E. A. Haugen

Prezo : bind. 15 ŝil., broŝ. 12ŝ. 6p., aŭfranko 9p.

Eldonis : ELDONA RONDO,
Boks 178, Trondheim, Norvegujo

/ Mendu ĉe via librovendisto aŭ ĉe
U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Tri monumentoj de la mondliteraturo

varme rekomendataj de la tuta Esperanta gazetaro pro la lingva perfekteco :

La Libro de la Spiritoj, de Allan Kardec, trad. de Porto Carreiro Neto.

Enhavanta 1018 demandojn kun detalaj respondoj pri ĉiuj problemoj de la homa vivo antaŭ kaj post la morto.

1 vol. 532-paĝa, bonega papero, broŝ. 10ŝ. 6p., aŭfranko 9p.

La Evangelio laŭ Spiritismo, de Allan Kardec, trad. de I. G. Braga.

Ĝi estas la plej klara eksplikado de la kristana religio el vidpunkto spiritisma.

1 vol. 432-paĝa, broŝ. 8ŝ. 6p., aŭfranko 8p.

Antaŭ du mil jaroj . . . de F. C. Xavier, trad. de Porto Carreiro Neto.

Historia romano pri la naskiĝo de Kristanismo kaj la Roma politiko de la 1-a jarcento de nia epoko.

1 vol. 400-paĝa, broŝ. 15ŝ., aŭfranko 6p.

Mendu ĉe

**Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth,
Herts., Anglujo**